

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*

INTERLINGVISTIKO KAJ  
ESPERANTOLOGIO

Intervjuo kun  
Andreas Künzli

Aleksandr Duliĉenko  
pri Juraj Križanić

Detlev Blanke pri  
bibliotekoj kaj muzeoj

Michel Duc Goninaz  
pri “la diabla vorto”

Bertilo Wennergren  
pri (ne)oficialaj vortoj

Naŭa Oficiala Aldono  
al la Universala  
Vortaro (komenco)

Novajtoj, diskutoj kaj  
recenzoj



Junio  
2007

№6

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2007. №6 (152)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefono** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2007**

*Internacia tarifo:* 32 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 18 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 390 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldono:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la paĝo 23 de la februara kajero.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 700 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (2000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1200 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (700 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (400 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2007.

"La Ondo de Esperanto" (Волна эсперанто). 2007, №6 (152).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 21 мая 2007 г.

Цена свободная. Тираж: 700 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

## Vortoj de Komitatano Z.

### *Duboj kaj esperoj pri nova Estraro*

**J**e tiu ĉi tempo devus okazi la elektado de komitatanoj B de JUEA. Ĝi ne okazas, ĉar por sep lokoj anonciĝis kvin kandidatoj. Kia honto, precipe se oni pensas, ke 15 homoj volas eniri la Komitaton laŭ rekta vojo kaj esti elektitaj kiel komitatanoj C. Al multaj el ili propra komforto evidente gravas pli ol respekto al la membroj. Lasi la membrojn juĝi estus tro riske.

Pri estraraneco revas 11 kandidatoj. Inter ili vera eltrovaĵo estas Probal Daŝgupto kiel ebla prezidonto. Sen sperto pri la organiza vivo de la asocio li verŝajne koncentriĝus al filozofumado pri grandaj demandoj, kio ja konvenas al prezidanto. Por la ekstera bildo tre bonan paron li havus en Barbara Pietrzak kiel ĝenerala sekretario. La publiko konas ŝin eĉ pli bone ol Daŝgupton, sed estas malfacile imagi ŝin nur kiel silentan protokoliston kaj prizorganton de teknikajoj. Mi konsilas sekvi la ekzemplon de Ivo Lapenna, kiu kiel ĝenerala sekretario respondecis pri informado, natura fako por Pietrzak.

Kun Daŝgupto kaj Pietrzak la Estraro verŝajne dediĉus sin al grandaj linioj kaj lasus la administradon al la direktoro. La konflikto, kiu antaŭ ses jaroj kondukis al la demisia krizo, laŭdire sekvis el troa enmiksiĝo de la Estraro en la vivon de la Centra Oficejo. Post la demisioj la enmiksiĝo atingis kulminon, ĉar estraranoj devis vole-nevole ekplenumi taskojn de la CO, eĉ redakti la Jarlibron. Rezultis kaoso kaj deficitaj. La repaciĝo de Corsetti kaj Buller ebligis restarigi normalan funkciadon de la bazaj strukturoj kaj ekvilibrigi financojn. Ni esperu, ke daŭros longe, ĝis iu Komitato aŭ Estraro forgesos la instruojn de la historio. Se la CO funkcias stabile, grava damaĝo ne okazus, eĉ se oni devus elreviĝi pri iu laŭvica Estraro.

La nomoj de iuj estraraj kandidatoj vekas dubojn. Kun la reglamentisto Yves Bellefeuille oni riskus daŭre disputi pri la interpreto de komoj en tiu aŭ jena regularo. Kun Marija Beloŝević UEA havus estraranon, kiu en sia lando fondis rivalan asocion apud la oficiala landa asocio de UEA. Ranieri Clerici estas aktivulo de la itala radikala asocio ERA, kun kiu UEA rompintis rilatojn kaj kiu pasintjare publike deklaris Corsetti komplico de teroristoj. La komitatanoj faros saĝe, se ili evitos elektojn, kiuj povus ŝarĝi la novan Estraron per malagrablaj streĉitecoj en tiu aŭ alia direkto, eĉ se la personoj mem ne estus sen kapabloj.

Dum mi skribas tion ĉi, ne estas konate, kiujn kandidatojn la elektokomisiono rekomendas. La komisiono ricevis denove samajn kritikojn kiel en antaŭaj fojoj. Indas demandi, ĉu komisiono por tia tasko entute taŭgas. Kial ne provi per komisiito? Komitatanoj proponu kandidatojn same kiel nun kaj unu saĝa spertulo, ne nepre komitatano, proponu el ili unu aŭ du eblajn teamojn. La rezulto ne povus esti pli malbona ol ĝis nun, sed ĝi povus esti pli bona. La kapablon de kandidatoj konsistigi teamon komisiito povus taksu pli bone ol komisiono, ĉe kies propra elekto oni ne atentis, ĉu ĝi povus funkcii kiel teamo.

*Komitatano Z*

Ĉi tiu *Ondo* ne enhavas kelkajn kutimajn rubrikojn, ĉar ĝi estas dediĉita al temoj esperantologiaj kaj interlingvistikaj. Vi retrovos la teman ekvilibron en la sekva kajero.

# La plej granda enciklopedio en Esperanto

*Andreas Künzli respondas*

La eldono de *Universalaj lingvoj en Svislando* fariĝis evento en Esperantujo. Neniam pli frue en Esperanto aperis enciklopedia libro tiel detala, tiel riĉe ilustrita, kaj tiel ... peza. Ĝia aŭtoro, 45-jara svisa filologo, historiisto kaj informadikisto, Andreas (Andy) Künzli, science esploris, sistemigis kaj prezentis la historion de la internaciaj planlingvaj movadoj en sia lando. Li afable konsentis respondi kelkajn demandojn de *La Ondo*.



## **Kiam vi komencis labori pri la Svisa Enciklopedio Planlingva?**

Ĉi tiu projekto estas malnova revo de mi. Post la fino de miaj slavistikaj studoj en la zurika universitato en 1992, dum 1993–94 mi havis la okazon labori en Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Tiukaze mi havis facilan aliron al la arkivoj de CDELI (Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia). Samtempe mi dissendis enketilon al la svissaj esperantistoj kaj komencis alimaniere kolekti materialon por la enciklopedio. Nature tiam ekzistis neniu konkreta imago kiam kaj kiel ĝi aperos. Certe mi orientiĝis koncepte laŭ la *Enciklopedio de Esperanto* de la jaro 1933.

## **Kiamaniere la projekto estis organizita kaj financita?**

Longe ĝi estis la privata projekto de Andy Künzli. Sojle de la 100-jariĝo de SES (Svisa Esperanto-Societo) en 2003 la projekto fariĝis oficiala kaj sponsorigita parto de ĝia *Agado 2003*. Ĝis la fino la laboro restis honorofica. SES kaj CDELI, kun aliaj privataj sponsoroj, transprenis la respondecon de la eldono kaj pagis la fakturon por la presado, kiu sumiĝis je pli ol 30 mil svissaj frankoj.

## **Ĉu la libro vendiĝas bone?**

Vidu: tiuspecaj libroj estas grandkvante malfacile vendeblaj, ĉar ili interesas precipe nur limigitan cirklon de la celita publiko. Estis presitaj 600 ekzempleroj, kaj povis esti venditaj ĝis nun certe ne pli ol 200 ekzempleroj, inkluzive de la subskripcia periodo. Longa tempolimo estas antaŭvidita por finvendi tian libron, kiel kutime ĉe similaj verkoj en Esperanto. Do la svisa enciklopedio ankoraŭ longe restos akirebla ĉe mi (kiel peranto de SES) kaj ĉe CDELI.

## **Kiaj estas la konkludoj pri la svisa planlingva movado?**

Iam ekzistis la Volapük-movado, kiu estingiĝis jam fine de la 19a jarcento. Samtempe aperis la Esperanto-movado, poste ankaŭ la movadoj de Ido, Occidental-Interlingue kaj de Interlingua (IALA). La ĉi-lastaj malaperis de la scenejo en Svislando, ĉar ilin apogis nur tre malmultaj homoj, kaj restis do nur la esperantistoj. En kelkaj ciferoj esprimite, la stato de la Esperanto-movado, kompare kun ĝiaj grandaj ambicioj servi kiel universala lingvo, estas sufiĉe modesta: Nuntempe nur 150 membroj konsistigas la landan asocion de Svislando, SES, kiu ekzistas ekde 1903, trideko da membroj partoprenas ĝian juran jarkunvenon, kaj manpleno da homoj estas hobia aktivaj. En la lastaj jaroj malfondiĝis diversaj Esperanto-asocioj kaj mortis gravaj figuroj de la svisa Esperanto-movado. Komprenoble la Esperanto-movado neniam ludis ian gravan rolon aŭ estis amas-movado en Svislando. La sola signifa publika agado en Esperanto eble estis la elsendo de Svisa Radio Internacia, kiuj ekzistis duonjarcenton ĝis 1992, kiam ili estis abolitaj. La sola signifa instalaĵo planlingva en Svislando restis CDELI en La Chaux-de-Fonds.

## **Do iom senperspektiva afero?**

Persone mi timas, ke post iom da tempo ankaŭ la Esperanto-movado ŝrumpas kaj povos malaperi, kiel tion prognozis Tazio Carlevaro en sia studo *Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045*. Sed mi ne estas tiom pesimisma pri la tutmonda stato de Esperanto. Se do ankoraŭ mia generacio ne kapablos refreŝigi la movadon en Svislando per novaj fortoj, Esperanto alfrontos malfacilajn tempojn. Nature de tempo al tempo ĉiam aperas iuj novaj fortoj —

sed tiuj personoj mem estas precipe mezaĝaj aŭ maljunaj kaj kutime hezitas aŭ rifuzas transpreni konkretajn taskojn aŭ respondecojn. De jaroj aŭ jardekoj pli malpli la samaj samideanoj gvidas la agadojn. La fenomeno ĉe la junularo estas, ke kun la tempolimo de 30 tiu publiko eksjunuliĝas, tiel ke la junularaj asocioj kutime ne ekzistas tre longe kaj kunfandiĝas kun la mezjunula publiko. Eterna problemo.

## **Kiuj estis la reagoj al la svisa enciklopedio?**

La homoj miris ĉefe pri la amplekso de tiu libro, pri la multaj bildoj, la diligenta laboro kaj la klera enhavo. Neniu atendis, ke ĝi fariĝos tiom dika (nome 1129 paĝojn). Origine ni kalkulis je sume 500 paĝoj, ne pli. Aldoniĝis la antologia parto, kiu faris la libron dukilograma. Mi atendas ankoraŭ kelkajn lucidajn recenzojn, kiuj rajtas esti ankaŭ kritikaj.

## **Kiuj laŭ vi estas la malfortoj de la libro?**

La esenca demando en tia projekto estas kiel prezenti ampleksan, heterogenan informaron en enciklopedieca maniero. Enciklopediece pensi signifas, ke oni devas kompakte, resume kaj interrilate pensi, konsiderante samtempe kiel eble plej multajn facetojn de la traktata temo. Krome oni devas zorgi por ekvilibrita, objektiva kaj korekta prezento de la informoj. La trovitaj informoj kaj fontoj ofte estas problemplenaj, ĉar eventuale ne sufiĉe fidindaj kaj malfacile kontroleblaj tra aliaj kanaloj. Ankaŭ la prezentitaj artikoloj ĉiam restas iel nekompletaj. Respondojn kaj sinpravigojn mi provis doni en la detala antaŭparolo de la enciklopedio.

Gravas ankoraŭ aldoni, ke mi ja ne havis la intencan skribi la definitivan,

— pĝ. 4



perfektan verkon! Komence la ambicio estis multe pli modesta, sed kun la tempo ĝi fariĝis pli alta. La teksto estis aranĝita per la programo *Microsoft Word*, kiu havas siajn kapricojn, kaj la tuto estis konvertita al la formato “pdf”, ĉar la presisto akceptis tiun formaton. Tio estis grandega avantaĝo. Aliflanke, la grafika aranĝo aspektas kelkfoje eble iom amatorece. Sed ni ne celis ion alian.

### Kiujn ĉefajn problemojn vi alfrontis dum la laboro?

La plej malfacila momento certe estis la plej lasta, produkta, presa fazo, ĉar tiu ĉi ne plu dependis de mi mem. Pro daŭraj komunikproblemoj kun la presisto en Neuchâtel okazis ĉagrenoj kaj prokrastoj. Kiam en junio mi donis la finitan prespretan diskon al la presisto, ni kredis, kaj tio estis ankaŭ promesita, ke la stoko estos presita kaj bindita, do liverita al ni, ene de 6–8 semajnoj. Sed tio estis granda kred-eraro. Kun ĉiuj perturboj, kiuj okazis en la dua duonjaro de 2006, inkluzive de fuŝpresado kaj represado de la libro, ni ricevis la libron nur fine de decembro, mi mem eĉ komence de januaro. Tio signifis, ke ni maltrafis plurajn okazojn por promocii kaj vendi la libron, ekzemple dum la UK en Florenco.

### Kiuj estas laŭ vi la plej legindaj artikoloj?

Da ili estas certe multaj, mi nomu nur kelkajn: interesa estas la tuta ĉapitro pri Volapük, kiu ja ankaŭ prezentas kelkajn kuriozaĵojn. Aliaj legindaj artikoloj temas pri gazetaro nacilingva, familioj esperantistaj, virinoj, Svislando, SES, UEA, Gonzague de Reynold, Hodler, Reverdin, Esperanta Civito, sed ankaŭ la ĉapitroj pri Ido, Occidental, Interlingua kaj interlingvistiko.

### En via enciklopedio aperas sufiĉe longa “omaĝo” al la Esperanta Civito. Kial tiom detale pri tio kaj kiu estas via persona sinteno pri tiu iniciato?

Ha interesa demando! Ĉar la Esperanta Civito (EC) rekte rilatas al Svislando, kie okazas multaj ĝiaj agadoj, ĝi estas prezentita en la enciklopedio, sed precipe ankaŭ por komprenigi al la legantoj pri kio temas kaj kiu estas la esenca kritiko pri ĝi. Mia tute privata aŭ persona opinio pri EC estas la jena: Kvankam kelkaj bazaj ideoj de EC eble estas iom interesaj aŭ eĉ aprobindaj, laŭ mi la fundamenta problemoj de EC troviĝas en tute alia(j) sfero(j): nome unue en la diametra, persista (kaj evidente senespera) opoziciemo de EC kontraŭ UEA (per kiu EC kvazaŭ neas la ekzistojn de UEA kaj senvalor-

igas la “finvenkismion”). Temas do iusence pri lukto de Davido kontraŭ Goliato. Due, multo dependas de la persona rilat- kaj esprimstilo de Giorgio Silfer, ĉefprotagonisto de EC, vidalvide de UEA kaj de diversaj ĉefrepresentantoj de la Esperanto-movado.

Aliaj kernaj problemoj de EC estas ankaŭ, ke ĝia koncepto estas tro eliteca, tro politikeca, la maniero de ĝia efektivigado iom ridinda kaj la informpolitiko iom unuflankeca; kiel “bela intelekta fikcio” EC estis trafe karakterizita de iu svisa esperantisto. SES kaj la plimulto de la svisaj esperantistoj klare distancigis de EC, ĉar en la nuna fazo de la svisa esperantismo ĝi estas nek taŭga nek necesa. Prefere oni deklaru EC-on pli kiel nedevigan eksperimenton anstataŭ kiel necesan potencon kun movadinter-na opozicia karaktero.

Ŝajnas al mi, ke la civitanoj pli kaj pli izoliĝas ene de la Esperanto-movado, kaj ke EC fariĝis pli malpli la privata afero de Silfer.

La homoj ĉirkaŭ EC estu pli sisteme aktivaj kaj produktivaj en esperantologio, interlingvistiko, ĉar potencialon ili posedas, sed ne sufiĉe ekspluatas ĝin, senutile dediĉante siajn tempon kaj monon al aferoj eble malpli prioritataj, malpli bezonataj.

### Sed ĉu UEA estas pli bona?

UEA ludas komplete alian rolon ol la EC: ĝi ĉefrepresentas, kiel monopolisto, la Esperanto-movadon; ĝi estas monolito, iom rigida, ege konservativa en sia kulturo, tamen sufiĉe heterogena kaj ankoraŭ sufiĉe potenca, ĉar portata de la mezaĝuloj kaj maljunuloj, de ĝiaj individuaj membroj, komitatanoj, estraro, CO, landaj asocioj. Do la disponebla infrastrukturo estas larĝa. Ĉi tiu organizo, fondita en 1908, jam fariĝis legendo kaj estas la sankta bovino

de la plimulto de la esperantistoj, kiuj kredas je la “fina venko” de Esperanto kaj atendas, ke UEA enkondukos, efektivigos ĝin. En sia nova libro *Lingvo kaj popolo* Tonkin ja aludis kelkajn esencajn problemojn de UEA.

Laŭ mi estus iom danĝere tro reformi UEA-n kaj la UK-on en ĝia nuna formo, ĉar la rezultoj de tiu reformo ne estus antaŭvideblaj. Oni evitu iel perforti la organizon. La perejo de UEA estus katastrofo por la tuta Esperanto-movado. Pro tio necesas nepre eviti la malfortiĝon de UEA. La plej diversajn tendencojn UEA absorbas en sia sistemo de fakaj organizoj. Sekve, kiel faka organizo de UEA, ankaŭ EC povus utile kunlabori kaj iom influu la evoluon de UEA kvalite, intelekto, kulturo, science. Estas do bedaŭrinde, ke Silfer, Martinelli, Ŝelazny k.a. ne partoprenas la UK-ojn, kie por la klerigado de la homoj ili certe estus utilaj kaj kie sine ili eble povus ludi eĉ pli grandan rolon ol kiun ili ludas kun sia efemera EC — paradokse ĉu ne?

Oni rememoru la tragikan finon de Lapenna sine de sia same efemera neŭtrala movado. Evidente la tradicia Esperanto-movado ne toleras “disidentajn” aŭ “renegatajn” strukturojn, same ne la idistojn siatempe, kiuj estis kondamnitaj kiel herezuloj kaj de la esperantistoj punitaj per totalaj ignorado kaj bojkotado.

### Kiajn novajn projektojn vi havas nuntempe?

Mi komencis verki germanlingvan biografion pri Zamenhof, kies tekston mi volus eldoni ĉe grava libroeldonejo en Germanio aŭ Svislando. Ankaŭ mi planas verki detalan biografion pri Edgar von Wahl, la aŭtoro de Occidental. Krom tio mi ŝatus verki ĝisdatigitan libron pri Svislando en Esperanto, ĉar *La Fenomeno Svislando* de Arthur Baur el la jaro 1979 ne plu estas tute aktuala. En la svisa enciklopedio devus esti prilaboritaj kompletigoj, eraroj, postrikoltoj, kiuj povas esti prezentitaj kadre de la retujo [www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch) aŭ iam en aparta kajero. Ankaŭ la detala nomindekso al tiu enciklopedio devus esti farita. Ĉar tiu estas granda laboro, mi rezignis krei ĝin kadre de la nuna eldono de la libro, kio certe estas grava manko, sed ĝi estus prokrastinta la aperon de la verko, kiu tamen devis aperi ne pli malfrue ol en 2006. Fine mi ŝatus diri, ke estus ĝojige, se krom en Svislando ankaŭ en aliaj landoj oni aĉetus la enciklopedion kaj eble eĉ imitivan ĝian ekzemplon, cele al la kreado de tutmonda enciklopedio planlingva laŭ landoj.



# Paroli la komunan lingvon, por esti komprenita de ĉiuj

de Aleksandr Duliĉenko



En la 17a jarcento racionalismo estis ellaboranta teoriaran bazon de la apriora-filozofia lingvoprojektado. Kritikante malperfektecon de la etnaj lingvoj, racionalismo malakceptis tiujn lingvojn mem.

Sed tiutempe naskiĝis kaj firmiĝis alia koncepto — pri vivanta lingvo kiel modelo por konstruado de pli perfekta lingvo. Laŭ ĝi necesus “korekti” tiun lingvon, aŭ, kun helpo de aliaj vivantaj aŭ “mortintaj” lingvoj, krei novan superlingvan sistemon, kiu respegulus plej ĝeneralajn kaj esencajn trajtojn gramatikajn kaj leksikajn. Ĝi estis nova ideo, kies praktika realigo signifis naskiĝon de la aposteriora lingvoprojektado en interlingvistiko, kontrasta al la apriora-filozofia, ĉar ĝi apogis sin sur la reala lingva sperto — ĝia bazo estis skribaj lingvoj funkciantaj aŭ ne plu uzataj. Laŭ tiu direkto poste evoluis internacilingva teorio.

## Slava patrioto kaj kleriganto

La fondinto de ĉi tiu ĉefvoja direkto en interlingvistiko estas Juraj Križanić, kroato laŭ la deveno, granda slava patrioto kaj kleriganto laŭ la misio, unu el la plej gravaj figuroj en la socia-politika intelekta vivo de la 17-jarcenta Ruslando. La eksterordinara vivo de Križanić meritas apartan rakonton.

En lingvistiko oni malbone konas lin, ankaŭ lia interlingvistika kontribuo ne estas laŭmerite taksita. Ni levu la kurtenon, precipe ĉar por kompreni la evoluon de la ideo de la universala lingvo gravas scii, en kiuj cirkonstancoj ĉi tiu ideo naskiĝis kaj ekevoluis.

Križanić naskiĝis en Kroatio, en vilaĝo “inter la riveroj Kupa kaj Vuna (Una)”, kiel li mem skribis. Lia nobela familio estis konata ekde la 13a jarcento, sed je la tempo de la naskiĝo de Juraj ĝi disfalis kaj malriĉiĝis. Kiam Juraj estis 16-jara, lia patro mortis. Ne plu estis eblo ricevi sisteman kleron, kaj li aliĝis al la Zagreba Katolika Seminario por dediĉi sin al religio. El

Zagrebo Križanić foriris al Vieno, poste al Bolonjo, kie estis kolonio de kroatoj kaj hungaroj. Jam sciante la germanan kaj la hungaran lingvojn (probable, ankaŭ la turkan), Križanić lernis tie la italan lingvon, juron kaj teologion.

Sukcese fininte siajn studojn en Bolonjo, en 1640 li ekloĝis en Romo por ricevi superan kleron en greka kolegio, speciale fondita por malriĉaj studentoj. La kolegio estis kreita por ortodoksaj kristanoj, por ke ili post la kolegio laboru por la Unio, t.e. por unuiĝo de la ortodoksa kaj romkatolika eklezioj (kompreneble, sub la gvido romkatolika). Križanić ne estis ortodoksa kaj tre malfacile ricevis permeson de la Kongregacio por aliĝi al la kolegio. Post la kolegio li estis sendita al la Zagreba diocezo.

Jam dum la lernado Križanić ekhavis ideon vojaĝi al Ruslando. Li plurfoje petis la Kongregacion sendi lin kiel misiiston al Ruslando. Poste, jam en Ruslando, li komprenis, ke unuiĝo de la du eklezioj estas revo nerealigebla. Anstataŭ labori pri unuiĝo eklezia li verkis grandiozan programon de unuiĝo de ĉiuj slavoj, premataj jen de turkoj (sudaj slavoj), jen de germanoj kaj hungaroj (okcidentaj slavoj), sub gvido de la plej granda slava lando, Ruslando, al kiu li strebis veni.

## Al Moskvo! Al Moskvo!

Nur en 1647 li sukcesis tra Vieno kaj Varsovio veni al la malnova rusa urbo Smolensk, tiutempe okupita de Pollando. En Smolensk li studis la historion de la slava skribo kaj eklaboris pri slava gramatiko. Aŭtune de la sama jaro, kiel interpretisto de pollanda ambasado, Križanić unuafoje ekiris al Moskvo — al sia delonga revo kaj espero. La ambasado kun 300 ĉaroj kaj 700 personoj malrapide, timante rabiŝtojn, iris antaŭen tra arbaroj laŭ la fama Smolenska Vojo.

Kun mirego Križanić gapis al lignaj kamparanaj domoj, al preĝejoj kupoloj

brilantaj sub la suno, al grandaj masonitaj domoj de riĉuloj, al remparoj kun turoj en kiuj deĵoris armitaj gardistoj. Lin mirigis la rusaj vaporbanejoj, sed li ne kuraĝis bani sin, kiam ambasadoj proponis tion. Fine, la ĉevaltrajno haltis sur monteto, la koĉeroj bridis la ĉevalojn, demetis siajn ĉapojn kaj komencis krucosigni sin, rigardante al preĝejoj videblaj antaŭe, kaj riverencis al Moskvo — la ĉefurbo de la Rusa Regno.

Moskvo mirfrapis la imagon de Križanić. Li konstatis en ĝi multajn preĝejojn kaj multajn blank-ŝtonajn domojn, precipe en la centro. Li pririgardis Kremlon, vizitis la Belan (Ruĝan) Placon, konatiĝis kun librovendejoj kaj tuj aĉetis unu libron. La tempo flugis tre rapide. Oni deklaris al la ambasadoro, ke “la Regnestro donas al ili donacojn kaj volas ke ili forveturu”. La ambasado forlasas Moskvon.

En 1650 Križanić en aŭstra ambasado vizitis Konstantinopolon. Veturante tra Serbio kaj Bulgario, Križanić ĉiam pensis pri la sorto de la slavaj popoloj. Li denove petis la Kongregacion sendi lin al Moskvo.

## 15 jaroj en Tobolsk

Perdinte la esperon, en 1659 li proprariske tra Pollando, Slovakio kaj Ukrainio venis al Moskvo. Oni longe pridemandis lin en la Ministerio pri eksteraj aferoj (*Posolskij Prikaz*) kaj post kvin tagoj raportis pri li al la caro Aleksio, menciinte ke Križanić konas kvar lingvojn, filozofion, gramatikon, retorikon, aritmetikon, muzikon. Ruslando bezonis tiajn homojn. La caro donis al li donacojn kaj akceptis lin por la ŝtata servo.

Križanić kelkfoje skribis al la caro proponon verki veran historion de Ruslando kaj de ĉiuj slavaj popoloj, slavajn gramatikon kaj vortaron. Li konatiĝis kun tiutempaj ŝtataj funkciuloj, perfektigis sian rusan lingvon, multe legis kaj verkis. Sed komence de 1661 Križanić estis arestita.





Laŭ cara ukazo:

*...estis ordonite al li esti en Tobolsk ĉe konvena ŝtata servo. Por la vivo li ricevadu sep rublojn kaj duonon dum monato.*

Ĝis nun oni ne konas kialon de ĉi tiu drasta decido de la caro. Tiam en Ruslando estis religia skismo, okazis disputado inter partianoj de la nova rusortodoksa ritario kaj malnovritanoj. Probable, Križanić nepripensite diris sian opinion pri tio, aŭ, eble, li estis suspektita kiel romkatolika spiono. Oni povas nur supozi.

Vintre 1661 li kaj aliaj ekzilitoj, eskortate de kozakoj, estis veturigita al Tobolsk. Malantaŭ li restis ruslandaj urboj — Rostovo la Granda, Jaroslavl, Vologda, Verĥoturje, Tjumenj. Longaj kaj malfacilaj estas la vojoj en neĝoplana Ruslando. Post pli ol unumonata vojaĝado li ekvidis ĉe la kunfluo de Tobol kaj Irtyŝ lignajn murojn de la siberia ĉefurbo Tobolsk, kie li poste pasigis 15 jarojn en domo, konstruita por li laŭ ordono de la vojevodo de Tobolsk.

En Tobolsk li renkontiĝis kun aliaj ekzilitoj. Li kunportis librojn. La konatiĝo kun la rusa historio, kun la socia, ekonomia kaj geografia stato de Ruslando donis al Križanić riĉan materialon por kelkaj verkoj, kiujn li kreis en Tobolsk. La ĉefa el ili estas *Politiko* — panoramo de la vivo kaj perspektivo de la Rusa Regno. Li senlace laboris, esperante ke la caro, leginte liajn verkojn, nuligos sian ukazon. Sed nur en 1676, post la morto de Aleksio, al Georgo el Serbujo (tiel oni nomis lin en Ruslando) kaj al aliaj ekzilitoj la nova caro Teodoro redonis la liberon.

### ... kaj poste

En Moskvo Križanić estis enoficigita kiel tradukanto en *Posoljskij Prikaz*. Sed sentante malfortiĝon kaj proksim-

iĝantan maljuniĝon, Križanić petis permeson reiri al sia hejmlando, kaj en 1678 kune kun dana ambasado li por ĉiam forlasis Ruslandon.

Tra Novgorod kaj Pskov li venis al Vilno; li monaĥiĝis en dominikana monaĥejo kaj verkis tie *Historion de Siberio* por misia agado de dominikanoj. Malfacile li sukcesis forlasi Vilnon kaj, kun armeo de Jan Sobieski iranta al milito kontraŭ turkoj, venis al Aŭstrio. 2 sep 1683 (12 sep, laŭ la Gregoria kalendara) li pereis dum sieĝado de Vieno.

### Unueco ne eblas sen komuna lingvo

Laŭ la ideoj de Juraj Križanić, la unuiĝinta slavaro povus sukcese evolui nur, se ĝi havus komunan lingvon. Liaj antaŭuloj, evoluigantaj la ideon de la slava unuiĝo (sudaj slavoj Vinko Pribojević kaj Mavro Orbini kaj aliaj) kredis, ke ĉiuj slavoj parolas la saman lingvon, kiu restas la sama en ĉiuj partoj de Slavujo. Križanić konsciis la lingvan disecon de la slavaro, kaj lia tasko estis krei komunan lingvon surbaze de la realaj lingvoj, efektiviĝi lingvan unuiĝon de ĉiuj slavaj popoloj. Li ne nur detale ellaboris sian projekton de la tutslava lingvo, li praktikis ĝin — preskaŭ ĉiuj liaj verkoj estas skribitaj tiulingve. Sed lia “kunparolanto” estis nur... papero.

La ideo de la tutslava lingvo kaj ĝia esenco estas priskribitaj en du verkoj de Križanić: *Konkluda klarigo pri la slava skribo* (1661) kaj *Gramatika priskribo de la rusa* [= tutslava — A.D.] *lingvo* (1666). La dua verko estas gramatiko de la tutslava lingvo, kiun li netigis kaj sistemigis en Tobolsk. Lia laborado estis malfacila: “rande de l’ mondo ... sen helpo kaj sen konsiloj de aliaj”, sen vortaroj kaj aliaj referenciloj, li kreis sian interlingvistikan verkon.

### Necesa instrumento de la saĝo

La koncepton pri la lingvo kiel materialo, permesanta certagradan konscian reguligadon, Križanić aplikis ankoraŭ antaŭ sia veno al Ruslando, kiam li penis normigi sian propran lingvon, por fari ĝin taŭga por presado de religiaj libroj. Križanić komprenis, ke evoluo de la lingvo devas iri la vojon de ĝia perfektigado. En *Konkluda klarigo pri la slava skribo* li skribis: “Neniu lingvo estis perfekta je sia naskiĝo, je sia komenco”. Perfektigado de la lingvo estas tasko, kiun oni devas konscie plenumi. La evoluanta, bone normigita lingvo, laŭ Križanić, akcelas socian progreson. En *Politiko* li skribis pri tio:

*Ni devas korekti kaj plibonigi nian lingvon, por ke ni povu gardi nin de malbona famo kaj pli sukcese okupiĝi pri sciencoj kaj diversaj ŝtataj aferoj.*

Eĉ pli, en la lingva doktrino de Križanić klare respeguliĝis ankaŭ racionalismaj ideoj: “La lingva perfekteco, — li skribis en *Politiko*, — estas la plej necesa instrumento de la saĝo kaj ties preskaŭ ĉefa signo”. Sed mal-laŭ la okcidenteŭropa racionalismo, Križanić imagis la konscie reguligitan lingvon nerompebla tutaĵo, unueca sistemo, kies aplikado devas konformi al bezonoj de la reala komunikado kaj al bezonoj de la pensado.

La certeco de Križanić pri tio, ke la lingvon oni povas prilabori, perfektigi kaj rekonstrui, baziĝis ankaŭ sur la plur-jarcenta funkciado de Slavono — liturgia kaj literatura lingvo, kiu servis kiel internacia lingvo por la slavoj kaj rumanoj same kiel la latina en la Okcidenta Eŭropo. Sed Slavono ne estis parola lingvo, kaj ĝian artefaritecon bone konsciis ĉiuj kulturagantoj, ankaŭ Križanić. Komence de la 17a jarcento Slavonon normigis la gramatiko de Meletij Smotrickij. Križanić ne estis kontenta pri tiu gramatiko, opiniante ke Smotrickij rekomendis tro multajn helenajn elementojn kaj modelojn. La gramatikon de sia tutslava lingvo Križanić imagis libera de neslavaj elementoj, tamen perfektigita por ke ĝi kontribuu al unuiĝo kaj socia progreso de la slavoj.

Križanić konis kelkajn interlingvistikajn provojn de la 17a jarcento. En Romo li konatiĝis kun Athanasius Kircher, kiu okupiĝis pri ideoj de univiersalismo kaj kreis ciferan pazigrafion. Ankaŭ en Romo li konatiĝis kun episkopo Juan Caramuel y Lobkovitz, kies patrino estis ĉeĥa, universala


sciencisto, kiu en 1630aj jaroj pripensis la ideon de la komuna lingvo, kiun li imagis kiel ciferan pazigrafion. Krome, Križanić bone komprenis ke inter la literatura lingvo kaj dialektoj estas granda diferenco. En la antaŭparolo por sia gramatiko li atentigis, ke heletoj, malgraŭ dialekta diseco, havis sian komunan skriban lingvon kaj bone interkompreniĝis. Same povas esti en la kazo de la slavoj. Malgraŭ multaj dialektoj, ili povas havi sian komunan lingvon, kompreneblan por ĉiuj slavoj. “Do, mi decidis paroli la komunan lingvon, por esti komprenata de ĉiuj”, — li skribis komence de la gramatiko de sia lingvo.

## La lingvo de Križanić

En la tutslava lingvo Križanić uzis du skribojn — cirilan kaj latinan. La unuan li uzis en pluraj verkoj, interalie en la du cititaj gramatikoj, kaj en la dua estas skribita lia plej granda verko *Politiko*. La cirila skribo estas en la malnova eklezia formo, sed ĝi havas plurajn ŝanĝojn: preskaŭ forestas *ѣ* (sed estas *ѣ*), estas enkondukita *ј* ktp. La latina skribo similas al la pola kun ties karakterizaj *w, sz* (š), *cz* (č), *ie* (por moligo de konsonantoj) ktp.

En la aspektoj gramatika kaj leksika la tutslava lingvo estas sintezo de diverslingvaj elementoj. La leksiko de ĉi tiu lingvo enhavas proksimume po 10% de rusaj, Slavonaj kaj serba-kroataj vortoj, sekvas kontribuoj pola, ukraina kaj aliaj. La komunslava vortaro konsistigas ĉ. 60%. Multajn vortojn Križanić mem kreis, uzante tutslavajn afiksojn. Li kreis precipe kompleksajn vortojn, ekzemple *samowladstwo* (aŭtokratio), *jedinowladstwo* (absolutismo), *ljudoder* (tirano), *ljudoderstwo* (tiranio) ktp.

Ankaŭ la gramatikon li modifis, penante sekvi la logikon kaj principojn de racio kaj ŝparemo. Ekzemple, li opiniis gramatika “eraro” tion, ke la slava gramatiko havis virgenrajn substantivojn kun la finaĵo *-a* kaj do en lia projekto estis ne *pijanica* sed *pijanice*



(drinkulo), ne *voznica* sed *voznik* (koĉero) kun fina konsonanto simile al aliaj virgenraj vortoj: *čelovek* (homo), *kuznec* (forĝisto), *poĵarnik* (estingisto) k.a. En malnovaj slavaj lingvoj krom singularo kaj pluralo estis ankaŭ dunombro (iam ĝi estis uzata por paroj da objektoj, kaj poste por ĉiuj objektoj da kiuj estis du). Križanić logike deduktis, ke ĉi tiu gramatika nombro estas finludinta sian rolon, kaj ke anstataŭ ĝi oni devas uzi pluralon (tiel poste okazis en plimultaj slavaj lingvoj).

Tamen Križanić ne sukcesis konsekvence uzi en siaj verkoj ĉiujn rekomendojn, kiujn li faris en sia gramatiko. En liaj tekstoj estas multaj gramatikaj, leksikaj kaj derivivaj variantoj. Tio ne estas hazarda: Križanić ĉiam eksperimentis pri lingvaj elementoj, penante trovi la plej oportunajn, necesajn, “perfektajn”. Sed al lia maniero elekti la lingvan materialon kaj ties elementojn influis baroko — arta stilo ekde la fino de la 16a jarcento ĝis la mezo de la 18a jarcento. En lia sintezado de diversaj elementoj de slavaj lingvoj respeguliĝis tipe baroka tendenco al bunteco, uzado de malsamspecaj fontoj, tendenco al certa trograndeco.

Malgraŭ ĉio, laŭ opinio de fama slavisto, akademiano Vatroslav Jagić: “Križanić en gramatiko montris altan inteligentecon”. Profesoro Alexander Brückner nomis la tutslavan lingvon de Križanić “ege granda provo en la historio de lingvistiko”. Sed Križanić mem tre kritike rilatis al sia laboro: “Estas rompita la glacia baro por tiuj laboremuloj, kiuj iros post mi”, — li skribis, kaj tie kie oni vidis mankojn aŭ erarojn, posteuloj povos “kaj aldoni kaj korekti”.

La tutslava lingvo de Juraj Križanić estas aposteriora lingvosistemo kiu plene koincidas kun neniu slava lingvo. Ĉi tiun vojon sekvis ankaŭ postaj kreintoj de interslavaj lingvoprojektoj — de slovako Ján Herkeľ kun *Lingua slavica universalis* (1826) kaj sloveno Matija Majar-Ziljski kun *Vzajemni slavjanski jezik* (1863–1865) ĝis *Mežduslavjanski jezik*, kolektive kreita dum 1954–1958 en Prago sub la gvido de Ladislav Podmele (pseŭdonimo: Jiří Karen).

## Ĉu utopio?

La ideo de la interslava lingvo, kiu kulture kaj lingve unuigus la slavajn popolojn, akompanas la tutan slavan historion. Ĝia utopieco iĝis ĉiam pli

evidenta laŭ ĉiusfera fortiĝado kaj struktura perfektigado de la literaturaj lingvoj de la slavaj popoloj. Por pli multaj el ili tio okazis en la 19a jarcento.

Sed en la tempo de Križanić la tutslava lingvo ne estis utopio: primare destinita por literaturo kaj skriba komunikado, ĝi povus esti uzata same, kiel estis uzataj aliaj, foje fremdaj literaturaj-skribaj lingvoj (ekzemple, la latina). Slavisto Anton Budilovič, rektoro de la Tartua universitato, opiniis ke la tutslava lingvo de Križanić povus esti uzata en Kroatio same, kiel tiutempe en Serbio funkciis, kiel lingvo literatura-skriba, t.n. rusa-slava lingvo — sintezo de rusaj, Slavonaj kaj serbaj elementoj.

Estas grave, ke la lingvistika eksperimentado de Juraj Križanić anticipis la direkton en kiu poste evoluis la internacilingva teorio — aposteriora lingvoprojektado, kiu en la moderna interlingvistiko estas konsiderata kiel la plej perspektiva. Preskaŭ ĉiuj postaj internacilingvaj projektoj, kiuj ricevis certan disvastiĝon kaj rekonon kaj trovis iun aplikadon en reala komunikado inter diverslingvaj popoloj, ankaŭ Esperanto, estis aposterioraj lingvoj, baziĝantaj sur la lingva sperto de la homaro.

Ekzemplo el la tutslava lingvo de Križanić:

*Iazika sowerszenóst iest sâmo potrêbno orûdie k' mudrósti, i iedwâ né stanowito iee známe. Czîm kîy naród îmaet izradnéyi iazik, tîm pri-godnée i witwornée razprawlyâet remestwâ i wsâkije umîtelyi, i promisli. Obîlie besédi, i legotâ izgówora, mnôgo pomagâet na mudrich sowétow izobretênie, i na wsâkich mîrnich i râtlich dël leznée obwerszênie.*

Traduko: Perfekteco de la lingvo estas la plej necesa instrumento de la saĝo kaj ties preskaŭ ĉefa signo. Ju pli bona estas la lingvo de iu popolo, des pli sukcese kaj bonrezulte ĝi laboras profesie kaj praktikas diversajn artojn kaj metiojn. Abundeco de vortoj kaj facileco de la prononcado tre helpas kreadon de saĝaj planoj kaj pli sukcesan realigon de diversaj pacaj kaj militaj aferoj.

En ĉi tiu lingvo estas verkita la tuta *Politiko* de Križanić.

Ĉi tiu teksto estas adaptita ĉapitro el *En la serĉado de la mondolingvo, aŭ interlingvistiko por ĉiuj* (Sezonoj, 2006) de profesoro A.D. Duliĉenko.



# Ni konservu la sciojn!

de Detlev Blanke

Pri kiuj scioj temas en la titolo?

Dum pli ol 120 jaroj seninterrompe akumuligis tre specifa scio pri tre malnova utopio de la homaro: la universala lingvo. Ke tiu ĉi utopio certagrade realiĝis, estas fakto vastege nekonata kaj tro ofte neakceptata. Tamen la scio pri la faktoj materiigis en formo de dokumentoj, libroj kaj aliaj informportiloj. Sed ĉu en la estonteco, se bezonate, oni sufiĉe kaj detale konscios pri niaj scioj, spertoj kaj atingoj? Ĉu la materialoj estos senprobleme alireblaj?

Kiel konate, tro ofte okazas, ke post la morto de sia prizorginto valora kolekto de libroj malaperas aŭ dissemiĝas diversloken. Tamen libroj ofte troviĝas en kelkaj kolektoj kaj bibliotekoj. Multe pli minacatas valoraj arkivaĵoj, ĉar ili kutime ne troviĝas en bibliotekoj kaj malprave estas taksataj ne tiom gravaj.

Ĉi-sekve mi klopodos prilumi kelkajn kriteriojn, kiuj helpu nin konsciiĝi pri problemoj ĉirkaŭ bibliotekoj kaj arkivoj. Ni diskutu necesan strategion de la Esperanto-komunumo pri tio, kiel certigi la konservadon de niaj spiritaj trezoroj kaj ilian transdonon al la postaj generacioj (Eo = Esperanto).

## Bibliotekoj, arkivoj, muzeoj

Por iom orientiĝi pri la temo ni provu kelkajn difinojn:

**Eo-biblioteko** estas kolekto de libroj, broŝuroj, revuoj kaj diversspecaj teknikaj registraĵoj (diskoj, sonbendoj, vidbendoj, disketoj, kompaktdiskoj k.s.), posedata de privatulo, organizaĵo, institucio aŭ eĉ de ŝtato. Enhave temas pri materialoj en aŭ pri Eo, (foje ankaŭ pri aliaj planlingvoj), ofte ankaŭ pri la internacia lingvo-problemo ĝenerale, ties aspektoj kaj

solvebloj (= interlingvistiko kaj esperantologio).

**Eo-arkivo** estas tutaĵo de kolektoj de ne-libroformaj dokumentoj, rilantaj al interlingvistiko kaj esperantologio, ĉefe al la historio de la loka, regiona kaj/aŭ internacia Eo-komunumo kaj ĝiaj personoj. Arkivaĵoj ĉefe estas diversspecaj aktoj, oficialaj kaj privataj dokumentoj, korespondaĵoj, manuskriptoj, sliparoj, kartaroj, bibliografiaj materialoj, kopioj de artikoloj, fotoj (paperaj, diapozitivaj, ciferecaj...), mikrofilmoj, varbiloj, afiŝoj, filatelaĵoj, objektoj ligitaj al la kulturo de la Eo-lingvokomunumo kaj aliaj planlingvaĵoj. Ofte temas pri postlasaĵoj de esperantistoj k.s. Malsame al libroj granda parto de arkivaĵoj estas unikaĵoj.

**Eo-muzeoj** ne nur kolektas diversajn objektojn kaj materialojn (librojn kaj arkivaĵojn), sed ankaŭ prezentas ilin por publiko, konstante aŭ por difinita tempo laŭ diversaj kriterioj, planoj kaj programoj. La distingo inter tiuj tri tipoj ne ĉiam facilas. Ofte temas pri diversakcenta kombino el inter ili. La menciitajn tri tipojn ni ofte nomas "kolektoj".

Orientiĝon pri niaj konservitaj scioj faciligas **bibliografioj** kaj **katalogoj**. *Bibliografioj* prezentas publikaĵojn ordigitajn laŭ temoj, verkistoj, landoj, revuoj, eldonejoj aŭ aliaj kriterioj. *Katalogoj* prezentas la materialon de difinitaj institucioj laŭ certa ordo kun preciza trovloko. Ekzistas kunfandiĝoj de ambaŭ tipoj.

## La situacio

En la *Jarlibro de UEA* (2006, pĝ. 82–84) ni trovas informojn pri nur 14 bibliotekoj el 12 landoj. Marinko Ĝijvoje (*Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj*. Zagreb, 1980) konsideris ankaŭ gravajn privatajn kolektojn kaj menciis entute 30 bibliotekojn el 21 landoj. Árpád Máthé kadre de la 77a UK (1992, Vieno) dum la esperantologia konferenco prezentis enketajn pri 99 bibliotekoj en 31 landoj kun po pli ol 1000 volumoj. Martin Weichert provis doni superrigardon en la interreto<sup>1</sup>, sed bedaŭrinde ne

kompletigis ĝin kaj mencias nur 14 kolektojn el 12 landoj. Tre malofte aperas bonaj priskriboj de difinita biblioteko kaj ĝia historio, kiel ekz. pri la *Biblioteko Hodler* de UEA en Roterdamo (Marcus Sikosek en LPLP 28 [2004]: 45-73).

De kelkaj grandaj bibliotekoj ekzistas broŝuraj, libroformaj aŭ nur sliparaj katalogoj, tamen pli kaj pli ofte ankaŭ elektronikaj.<sup>2</sup> Lastatempe en la reto estas storataj pli kaj pli da plenaj tekstoj de diversspecaj libroj. Mankas al ni plena superrigardo pri ĉio, kio okazas lige al nia temo en la reto. Mi siatempo (ĝis 1984) registris 40 katalogojn kaj bibliografiojn (en: *Internationale Plansprachen*, Berlin, 1985: 302-304).

Intertempe la kvanto verŝajne almenaŭ duobliĝis (Vidu en mia broŝuro: *Interlingvistiko kaj esperantologio: vojoj al la faka literaturo*, Roterdam: UEA, 2003: 23-25).

## Distingaj kriterioj

Distingo laŭ difinitaj kriterioj aŭ karakterizaĵoj helpas starigi tipologion de kolektoj, kio faciligas ilian priskribon kaj adekvatan trakton.

Mi devas ignori bibliografiojn kaj katalogojn, kiuj meritas apartan eseon, kaj limigas min al kolektoj. Mi trovis 23 kriteriojn, kiuj estas de malsama graveco, foje ekskludas unu la alian, parte interdependas kaj interrilatas, sin influas reciproke kaj diversefike. En rektaj krampoj mi mencias influon de aliaj kriterioj:

1. *Ĉefa tipo*: kutima biblioteko, arkivo, muzeo (kun transiroj inter la tri tipoj).

2. *Jura statuso*: formo de posedo: propraĵo de privatulo, Eo-organizaĵo (kluba, regiona, tutlanda, internacia), aŭ de ŝtata biblioteko, muzeo aŭ alia institucio [memstareco, stabileco].

3. *Amplekso*: kvanto da materialo [jura statuso, financoj, specialiĝo, aktualeco].

4. *Specialiĝo*: ekz. nur esperantaĵoj aŭ ankaŭ materialoj pri aliaj planlingvoj; specialiĝo pri beletro, scienc-teknika literaturo, laborista movado, revuoj k.s. [tipo].



5. *Registriĝo*: ekzisto de katalogo (papera aŭ elektronika) [kataloga tipo, ordigo, flegateco, prizorgateco].

6. *Kataloga tipo*: presita aŭ surdisk(ed)a katalogo, elektronika aliro en la reto [registriĝo, ordigo].

7. *Ordigo*: formo de ordigo (laŭ nacia aŭ internacia normo, dekuma klasifiko aŭ propra sistemo), alfabeto aŭ enhave ordigita ktp. [registriĝo, specialigo, kataloga tipo].

8. *Flegateco*: grado de flego, ordo, kvalita stato de papero kaj bindo [prizorgateco, jura statuso, teknika ekipo, tipo de ejo, financoj].

9. *Prizorgateco*: regula (aŭ manko de) prizorgado flanke de salajrulo aŭ volontulo [flegateco, financoj, jura statuso].

10. *Priskribiteco*: priskribo de la kolekto en studoj aŭ aliaj formoj, eventuale eldono de pribiblioteka bulteno kun registro de novaj akiraĵoj [registriĝo, kataloga tipo, flegateco, ordo].

11. *Alireblo*: viziteblo, uzebleco por interesiĝantoj [jura statuso, pruntservo, teknika ekipo, tipo de ejo, geografia situo].

12. *Pruntservo*: eblo pruntepreni materialojn, ligiteco al la interbiblioteka (inter)nacia pruntservo [jura statuso, persona aliro, uzateco; registriĝo, kataloga tipo].

13. *Aktualeco*: kolekto malnova kaj fermita aŭ daŭre aktualigata [amplekso, financoj, prizorgateco, flegateco, specialigo].

14. *Teknika ekipo*: ekzisto de modernaj bretaroj, kestoj, komputiloj, kopiiloj, laborloko por esplorantoj, bindiloj, mikrofotiloj ktp., sed ankaŭ humidec-stiriloj, alarmiloj, fajro-estingiloj [jura statuso, financoj, prizorgateco, flegateco].

15. *Tipo de ejo*: teknika konveneco, trovebleco [alireblo, jura statuso, teknika ekipo, flegateco, prizorgateco, financoj].

16. *Memstareco*: memstara kolekto aŭ parto de iu alia (universitata aŭ alispeca (ne)ŝtata institucio ktp.) [jura statuso, stabileco, financoj].

17. *Stabileco*: tipo de pozicio kaj perspektivo [jura statuso, flegateco, prizorgateco, financoj].

18. *Financoj*: regulaj aŭ okazaj subvencioj [jura statuso, prestiĝo, stabileco, uzateco].

19. *Programfunkcio*: kolekto sen aŭ kun akompanaj klerigaj programoj (seminarioj, kolokvoj, ekspozicioj, gvidadoj), kun aŭ sen eldonejo [tipo, jura statuso, prizorgateco, teknika ekipo, financoj].

20. *Prestiĝo*: pozicio en la (inter)nacia biblioteka pejzaĝo, grado de konateco, faka registriĝo (ekz. en pribibliotekaj manlibroj [jura statuso, amplekso, specialigo, stabileco, uzateco, financoj].

21. *Kunlaboro*: kontaktoj, kunlaboro kun aliaj bibliotekoj, interŝanĝo de duoblaĵoj, reciproka helpo ktp. [jura statuso, tipo, prizorgateco].

22. *Uzateco*: prunteblo aŭ alispeca uzeblo [tipo, amplekso, specialigo, priskribiteco, registriĝo, prestiĝo, alireblo, teknika ekipo, tipo de ejo, pruntservo, geografia situo ktp.].

23. *Geografia situo*: trafika atingeblo [alireblo, uzateco].

### Provo de tipologio

Aparte gravas la kriterioj pri la *jura statuso* kaj *memstareco*. Ili influas multajn aliajn kriteriojn. En la tipologio difinita kolekto povas esti klasigata diversmaniere. La leganto klopodu mem klasifiki sian aŭ iun al li/ŝi konatan kolekton. Jen provo kun kelkaj elektitaj ekzemploj:

1. Kolektoj en tutŝtataj bibliotekoj aŭ arkivoj

1.1. Relative memstara kolekto en nacia biblioteko (Planlingva kolekto de Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno/Aŭstrio)

1.2. Subkolekto en ŝtata arkivo (Biblioteko kaj arkivo de GDREA en la Ŝtata Arkivo de Germanio/Berlin)

2. Kolektoj en universitataj bibliotekoj

2.1. Relative memstara kolekto (Biblioteko de Itala Interlingvistika Centro en la Universitato IULM, Milano/Italio)

2.2. Subkolekto (Eo-kolekto en la Katolika Universitato de Lublino/Pollando)

3. Kolektoj en komunumaj aŭ urbaj bibliotekoj

3.1. Relative memstara kolekto (CDELI en la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds/Svisio)

3.2. Subkolekto (Biblioteko de Germana Esperanto-Instituto en la urba biblioteko de Aalen/Germanio)

4. Kolektoj en urbaj institucioj

4.1. Specifa institucio (Eo-laboristmovada arkivo en Fritz-Hüser-Instituto, urba komunumo Dortmund/Germanio)

4.2. Urba muzeo (kolekto de Ĉeĥa Eo-Asocio en la Urba Muzeo de České Třebové/Ĉeĥio)

5. Kolektoj kiel posedaĵo de neŝtataj organizaĵoj

5.1. Internacia neŝtata organizaĵo

(Biblioteko Hodler de UEA, Rotterdam/Nederlando)

5.2. Nacia neŝtata organizaĵo (Biblioteko Butler de Brita Eo-Asocio en Barlastono)

5.3. Eo-Klubo (biblioteko de Hamburga Eo-Klubo en Hamburgo/Germanio)

6. Privataj posedaĵoj

6.1. Privata, limigite publika (Interkultura Centro Herzberg/Germanio)

6.2. Private nepublika (la sciencaj kolektoj de Irmu kaj Reinhard Haupenthal, Malaucene/Francio; Detlev kaj Wera Blanke, Berlin/Germanio)<sup>3</sup>.

### Kelkaj defioj

Por plibonigi la situacion laŭ mi i.a. necesas:

1. *Registrado kaj priskribo* de ĉiuj iom gravaj Eo-kolektoj, katalogoj kaj bibliografioj en nacia kaj internacia skaloj. Kompilo de *baza dokumento* pri la situacio, kiu estu aktualigata de tempo al tempo.

2. Aparta registrado de ĉiuj *enretaj materialoj* (katalogoj, bibliografioj, listoj de elprinteblaj libroj k.s.).

3. Iom-post-ioma starigo de *centra elektronika katalogo*, kiu registru la materialojn de kiom eble plej multaj kolektoj.

4. Surbaze de 1–3 kreo de kiom eble kompleta kaj daŭre aktualigenda *elektronika bibliografio* de publikaĵoj en kaj pri Esperanto (kaj pri aliaj gravaj planlingvoj). De tempo al tempo la bibliografio aperu en papera formo. Ankaŭ imageblas kunigo de 3 kaj 4.

5. Kreo de *institucioj* (ĉe naciaj aŭ internaciaj Eo-organizaĵoj), kiuj konsciigu materialhavajn esperantistojn, ke ili antaŭzorgu pri siaj kolektoj transdonante ilin al difinitaj institucioj.

6. Kreo de *reto de informado, kunlaboro kaj reciproka helpo* de la bibliotekoj kaj arkivoj, i.a. por distribuado aŭ interŝanĝado de duoblaĵoj al interesataj personoj, bibliotekoj, arkivoj kaj organizaĵoj; donaco de duoblaĵoj al nove fonditaj aŭ subten-bezonaj organizaĵoj en malriĉaj landoj ktp.

### Notoj

1. Vidu: <http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/bibl/>

2. Tre konatas tiu de Vieno: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm>

3. Laŭkontrakte la biblioteko kaj arkivo de Detlev kaj Wera Blanke je fiksenda dato eniros la ŝtatan arkivon de Federacia Respubliko Germanio.



# Kiel la anĝela po povas helpi vin por ricevi dolarojn, manĝi pomojn kaj eble ĉesigi la fumadon

de Michel Duc Goninaz

Fantomo hantas en Esperantujo kaj teruras multajn — la vorteto *po*. Laŭdire iu akademiano nomis ĝin “la plej malfacila vorto en la lingvo”<sup>1</sup> kaj alia konfesis, ke li evitas ĝin uzi. Lastatempe neformala diskuto pri ĝi en Akademia diskutolisto revekis malnovajn kverelojn, komenciĝintajn dum la unuaj vivojaroj de la lingvo. Tamen tiu senkulpa vorteto neniel meritas la misfamon, kiun André Cherpillod resumis per la kromnomo “la diabla vorto”<sup>2</sup>.

Du problemoj interplektiĝas koncerne ĝian uzadon: unuflanke, ĝia senco, aliflanke ĝia gramatika kategorio kaj konsekvence ĝia sintaksa rolo.

La senco estas la pli facile traktebla demando. “*Po* antaŭ kvantesprimo signas, ke tiu kvanto estas unu el la egalaj partoj de sia plurablo”<sup>3</sup>. Misuzo de *po* komenciĝis tre frue. Tial Zamenhof devis precizigi ĝian signifon en lingva respondo de 1908<sup>4</sup>:

*Oni ne povas diri “je 80 centimoj po funto” aŭ “30 mejlojn po horo”, sed oni devas diri “po 80 centimoj por (ĉiu) funto”, “po 30 mejloj en horo”.*

Malgraŭ tiu atentigo la misuzoj disvastiĝis, kaj la Akademio devis fari la saman rimarkon en 1974<sup>5</sup>. Ankoraŭ nun iuj obstinuloj anoncas iujn turismajn tarifojn “po tago” aŭ “po persono”. Oni kutime klarigas tiujn erarojn per alilingvaj influoj. Kompari nian lingvon kun aliaj estas didaktika procedo ĝenerale ne rekomendinda. Oni normale ne uzas lingvon per traduko el alia. Sed ni scias, ke por multaj esperantistoj la memstareco de Esperanto ne estas memkomprenebla, kaj en okazo de dubo la komparoj kun aliaj lingvoj estas neeviteblaj. Pli grave eĉ: pro la kulto al la *Fundamento* oni emas referenci al ties *Universala Vortaro*, kiu donas absurdan privilegion al la uzantoj de kvin eŭropaj lingvoj kaj

krome enhavas abundon da eraroj. Tial ni ne povas eviti rigardon al la tradukoj de *po*.

## Po en la Universala Vortaro

La tradukoj rusa kaj pola (*no*, *po*) kun la nepre necesa precizigo “ĉe numeraloj”, proksimume taŭgas — sed nur por slavlingvanoj. La franclingva kaj anglalingva tradukoj *par* kaj *by* estas plene eraraj kaj erarigaj. Pluraj uzoj de la germana *zu* kun numeraloj tute ne kongruas kun la senco de nia *po*. Restas la aliaj menciitaj franclingvaj esprimoj *au* *taux de*, *sur le pied de*, kiuj esence ne estas malĝustaj, sed mallerte elektitaj. La plej bona traduko franclingva estas *à raison de*, menciita en la bonaj lernolibroj kaj vortaroj por franclingvanoj, sed ne troviĝanta en la *Universala Vortaro*. Similaj prepoziciaĵoj ekzistas en aliaj latinidaj lingvoj. El la fuŝaj tradukoj de la UV nur la angla estis korektita de la Akademio<sup>6</sup>, kiu anstataŭigis la eraran *by* per *at the rate of*. Tiu anglalingva prepoziciaĵo iĝis do la plej taŭga “oficiala” traduko, krom la slavaj, por kompreni la sencon de *po*. Kompreneble la uzo de *po* en esperanto estas iom pli vasta ol tiu de *à raison de* aŭ *at the rate of*, ĉar nia lingvo estas pli libera kaj pli fleksebla, ol la naciaj lingvoj, kaj krome unusilaba prepozicio estas pli volonte uzata, ol kvarsilaba prepoziciaĵo. Sed per tiuj ĝustaj tradukoj anglalingva kaj franclingva ni konstatas la absurdecon de la mito, laŭ kiu *po* estas iu slava specialaĵo, preskaŭ esoteraĵo, kiun nur slavoj kapablas normale funkciigi.

## La gramatika kategorio de po

La kvin tradukoj de *po* en la UV, eĉ se malperfektaj, klare montras, ke Zamenhof konceptis ĝin prepozicio. Ĉar tion konfirmas ĉiuj frazoj, en kiuj li uzis ĉi tiun vorton (M.C. Butler registris 228 citaĵojn)<sup>7</sup>, ekzistas neniu kialo por tion pridubi aŭ por supozi, ke *po* povas esti jen prepozicio, jen io alia.

Se ni konas la sintaksan rolon de *po* kaj ĝian sencon, ĉio devus esti en ordo

kaj ĝia uzado ne devus starigi problemojn. Sed jam en la unuaj jaroj ekestis duboj pri la sintaksaj ecoj de vortoj, aperantaj en frazoj, kiuj enhavas tiun prepozicion, kaj oni konstatis formajn diferencojn en la produktitaj frazoj. “Lingva respondo” de 1891 pritraktis la jam aperintajn dubojn pri la formo de tiaj frazoj.

Tiu respondo de Zamenhof bedaŭrinde analizas ne tutan frazon aŭ tekstoparton, sed prijuĝas t.n. “esprimojn”, t.e. sinsekvon de vortoj sen nepra komuna sintaksa rolo. La demando estas formulita malĝuste: kio estu “post po”. Estas vere, ke prepozicio antaŭas iun substantivan sintagmon, sed la formulo “post”, en lingvo kun tre granda libereco de la frazelementoj, ne estas sintakse valida. En la unuaj eldonoj de la *Lingvaj Respondoj*<sup>8</sup>, la titolo jam donis la respondon: *Nominativo post “po”*. Sed la eldonoj sesa kaj sepa, editoritaj de Waringhien, donas al tiu respondo pli duban titolon: *Pri la kazo post “po”*. Ni ja scias, ke en nia lingvo ĉiu prepozicio postulas la t.n. nominativon, sed, kiel jam dirite, tiu “post” povas starigi problemojn.

Ni ekzameni tiun respondon:

*Inter la esprimoj “doni po 2 pecojn” kaj “doni po 2 pecoj” estas ankoraŭ malfacile diri, kiu estas la pli bona, kaj tial ambaŭ esprimoj estas uzablaj kaj bonaj. Tamen konsiderante, ke danke la intervenon de la vorto “po” la “pecoj” jam ne dependas rekte de la “doni”, ni konsilas uzi post “po” (tiel same kiel post “da”) la nominativon. Alia kaŭzo por tiu ĉi konsilo estas ankaŭ la cirkonstanco, ke laŭ nia opinio “ĉie, kie oni dubas inter la nominativo kaj akuzativo, oni devas uzi la nominativon.”*

La unua frazo sonas strange. Se oni demandus Zamenhofon, kiu el la esprimoj “fermi la fenestron” kaj “fermi la fenestro” estas la pli bona, li certe ne respondus, ke ambaŭ estas uzablaj kaj bonaj. Li certe dirus, ke unu el ili estas malĝusta. Se oni demandus lin pri “manĝu la kokidon” kaj “manĝu la

kokido”, li certe respondus, ke ambaŭ ja eblas, sed kun granda sencodiferenco pro la malsamaj sintaksaj strukturoj. Tamen en lia iom konfuza argumentado aperas spuro de sintaksa analizo, la koncepto “dependo”. Se *pecoj* dependas de prepozicio, ĝi evidente ne povas ricevi la morfemon *-n*. Kial do “doni po 2 pecojn” povas esti “uzebla kaj bona”? Ĉar, kiel sugestas Zamenhof, oni povas uzi la vorton *pecojn* kiel dependaĵon (objekton) de *doni*. Tiun procedon Zamenhof malkonsilis, sed li ĝin ne kondamnis, ĉar el sintaksa vidpunkto ĝi estas akceptebla. La sintaksa konsekvenco de tia frazkonstruo estas evidente, ke *pecojn* ne apartenas al la po-sintagmo, kiu tiuokaze reduktiĝas al *po du*. Tion konfirmas ĉiuj komentintoj, kiuj, por pravigi la uzon de akuzativo, deklaris, ke en la frazo “mi donis po du pecojn” *po* koncernas nur la numeralon. Tian frazon oni devas jene analizi: verbo: donis / subjekto: mi / objekto: pecojn / adjekto: po du. La senca konsekvenco estas ankaŭ ege grava: la vorto “pecojn”, kiu ne dependas de “po”, ne povas rilati al “du”. Ĝi ne signifas “du pecojn”, sed oblon de du (kvar, ses, ok ktp), t.e. la tuton, kiun oni “donas”. La fina konsilo (elekti nominativon en okazo de dubo) havas nenian lingvonorman valoron. En sintaksaj aferoj, kiam oni dubas, oni devas pripensi ĝis malapero de la dubo. Sed tiu konsilo povas interpretiĝi humure. Ekzistas homoj, kiuj aplikas la moton “Kial agi simple, kiam oni povas agi malsimple?”. Zamenhof kvazaŭ instigas, ke ni ne imitu ilin. Ne necesas dependigi la o-vorton de la verbo — kaj konsekvenco ĝin akuzativigi —, se sufiĉas ĝin dependigi de *po*, sen uzo de *-n*.

### Po en la Ekzercaro

Pli utila, ol la Universala Vortaro, estas la Ekzercaro de la Fundamento, en kies 14a paragrafo troviĝas du ekzemploj, kiuj senmanke ilustras la respektivajn rolojn de la o-vorto akuzativigita kaj de la o-vorto en po-sintagmo:

1. *Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj*: “12 pomojn” reprezentas la tuton, “po 3 pomoj” la kvoton, rezulte de la divido de 12 per 4.

2. *Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj*: “60 paĝojn” aŭ “la tutan libron” reprezentas la tuton, “po 15 paĝoj” la kvoton. Supoze, ke la aŭtoro povas malapertigi informojn, kiujn la ricevanto de

la mesaĝo jam konas (ekzemple, ke temas pri libro kaj ke tiu libro estas sesdek-paĝa) aŭ povas facile kalkuli (nome, ke kvartaga legado sufiĉos), restos la frazo:

*mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj.*

Neniu estas sintakse ŝanĝita kaj ekzistas neniu kialo por aldoni la morfemon *-n* al “paĝoj” post simpla elipso de la ceteraj frazeroj.

### La elipso

Kial do iuj esperantistoj — inter ili kelkaj spertaj kaj eĉ famaj — ekhavis la ideon uzi akuzativigitan o-vorton “post *po*”? Se po-sintagmo estas uzata supleme, tiu problemo ne ekzistas, kiel videblas el la frazoj laŭ la modelo:

*mi fumadis cigaredojn po dudek kvin rubloj por cento*<sup>2</sup>.

Sed, se po-sintagmo estas uzata adjekte, ni foje trovas en la sama frazo aŭ en frazo apuda du vortojn, kiuj reprezentas la saman eksterlingvan aferon. Tio ofte okazas sen interveno de la laŭdire malfacila vorto *po*. Ekzemple en la frazo

*mi elektis la plej belan knabinon el la tri*


estas klare, ke elipsiĝis la vorto “knabinoj”, kiu, kvankam tre diferenca de “knabino” per la nombro kaj kazo, havas la malavantaĝon ripeti la leksemon “knabin”. La samo okazas en po-frazo. En normala komunikado kaj bona stilo oni evitas ripeton kaj elipsas iun el leksemoj. Zamenhof sistemece elipsis la objekton. Tiel la saturita frazo:

*mi fumas tabakon po dek cigaredoj ĉiutage*

simpliĝas en la Zamenhofa lingvaĵo al *mi fumas po dek cigaredoj ĉiutage*,

en kiu la verbo *fumas*, kvankam transitiva, estas uzata sen objekto, kio en nia lingvo tute eblas, kiel montras la frazo *li fumas multe*. Tiu elipso eblas nur, se en la eksterlingva realo la vorto “tabakon” estas facile konjektebla. Se Zamenhof fumus ion alian, li certe dirus

Slipo pri *po* en la internacia rektametoda Esperanto-kurso de Stano Marček (2006).



*mi fumas haŝiŝon po dek rulaĵoj ĉiutage*

kaj neniu ekdubus, ke la o-vorto, kiu troviĝas en la po-sintagmo neniel povas aperi akuzative. Sed, se anstataŭ la vorto “tabakon”, oni uzas la vorton “cigaredojn”, la ripeto iĝus netolerebla, kaj tiam oni devus elekti inter “cigaredojn” kaj “cigaredoj”. Iuj homoj malvolonte uzas transitivan verbon sen objekto. Ili do povas, diference de Zamenhof, elekti la objekton kaj diri:

*mi fumas cigaredojn po dek ĉiutage.*

Estas evidente, ke la vorto “cigaredoj”, kiu devus troviĝi post “dek” estas elipsita kaj ĉio restas klara. Bedaŭrinde, iuj homoj, kiuj ŝatas kompliki la simplajn aferojn, translokas “cigaredojn” post “dek”: tio ja eblas pro la granda sintaksa libereco de nia lingvo, sed kreas tre danĝeran konfuzon, ĉar la aŭskultanto aŭ leganto, kiu ne vidas la dudimensiajn sintaksajn skemojn, sed aŭdas aŭ legas unudimensie unu vorton post la alia, kredos, ke la vorto “cigaredojn” rilatas kun “dek”, dum laŭsintakse kaj laŭsence ĝi reprezentas oblon de dek. Homoj, kiuj ne spertas en sintaksa analizo, devus almenaŭ kompreni tiun simplan aritmetikan operacion. Por evidentiĝi, ke en tiaj frazoj la akuzativigita o-vorto ne dependas de *po*, eĉ se troviĝanta “post” ĝi, sufiĉas aldoni iun determinilon, ekzemple *la*:

*Ĉiutage mi fumas po dek la cigaredojn*

aŭ determinilojn pli eksplicitajn, ekzemple:

*Ĉiutage mi fumas po dek la luk-sajn cigaredojn, kiujn mi aĉetis (aŭ: kiujn oni donacis al mi)*

aŭ:

*Al la infanoj mi donis po kvin ĉiujn miajn dolarojn*

kio rivelas la ĝustan sintaksan strukturon de la mallerta frazo *al la infanoj mi donis po kvin dolarojn*.

Imagu, ke Zamenhof laŭdirinde decidus redukti sian tabakokonsumon. Venos momento, kiam li fiere anoncos:

*mi fumas po unu cigaredo ĉiutage.*

Sed, se li volus imiti la ŝatantojn de akuzativo kaj senprudente transloki la akuzativigitan vorton post la po-sintagmo, li devus diri en tute ĝusta esperanto la solan ĝustan tiustrukturan frazon:

*mi fumas ĉiutage po unu cigaredojn.*

Reto Rossetti<sup>1</sup> en sia polemiko kun Kalocsay pri tiu dorna temo, asertas, ke “tiun formon uzas neniu”. Tre probable, sed frazoj laŭ la modelo *\*mi*



fumas po unu cigaredon, kiujn oni ofte renkontas, estas nepre absurdaj, ĉar la uzo de dividita *po* implicas multiplikon, kaj la akuzativigita vorto el la leksemo *cigared*, kiu signas la tuton de la fumaĵo, estu nepre plurala, eĉ se oni ĉesigus la fumadon post du tagoj. Tion demonstras la sama frazo sub la formo

*mi fumas cigaredojn po unu ĉiutage,*

kiu estas samtempe ĝusta sintakse kaj perfekte klara. La akuzativo estas do ebla, kondiĉe, ke oni ne uzu ĝin sen-prudente.

La aŭtoroj de la Plena Gramatiko fantasmis pri studentinoj, kies respektivaj nombroj de amantoj ne estas difinitaj. Anstataŭ numeralo oni en tiaj okazoj uzas adjektivojn “kelkaj” “pluraj” aŭ “(mal)multaj”. Estas klare, ke tiuj adjektivoj, dependantaj de *po*, restos sen *-n*, dum, pro la verbo “havas”, oni povas senti la bezonon esprimi akuzative la suman nombron de la amantoj. Rezultus la jena frazo:

*Tiuj studentinoj havas po pluraj amantojn.*

Por evitigi, ke iu malprudentulo aldonus *-n* al “pluraj” (el kio rezultus, ke la malfeliĉa *po* ŝvebus sen komplemento, do en la nenieco), mi konsilas diri:

*Tiuj studentinoj havas amantojn po pluraj.*

Tiu solvo kontentigos ne nur la dezirojn de la aluditaj studentinoj, sed ankaŭ la postulojn de nia gramatiko kaj de klara stilo.

La demonstiron pri la elipso faris R. Rossetti, kiu erare nomis ĝin “elizio”. A. Cherpillod komentis, ke “tiu rezonado montras la grandan lertecon kaj imagpovon de sia aŭtoro, sed tute ne estas necesa”. Tiu ĉi komento, implikanta, ke Rossetti uzis trukon por pravigi sian tezon, estas maljusta kaj malĝusta. En la Zamenhofaj frazoj kun transitiva verbo (*mi legas po dek kvin paĝojn ĉiutage*), la foresto de objekto ja sugestas elipson (“libro(j)n, revuo(j)n” ks). En la alia ebla frazotipo (*mi legas paĝojn po dek kvin ĉiutage*), la manko de o-vorto en po-sintagmo eĉ pli evidente rezultas de elipso (“paĝoj”), ĉar normale prepozicio enkondukas o-vorton. Kiel diriĉe ĉi-supre, tiajn elipsojn ni faras tute normale en iuj ajn frazoj por eviti ripeton, kaj kun la uzo de *po* ni ricevas tiajn frazojn:

*Ĉiuj trinkis glasojn po tri* (elipso de “glasoj”) aŭ *Ĉiuj trinkis glasojn po unu* (elipso de “glaso”).

Cetere, la tipa frazo kun akuzativo kaj po-sintagmo estus:

*Ĉiuj trinkis vodkon po tri glasoj / po unu glasoj,*

en kiu tute klaras ke la vortoj *glasoj/glasoj*, dependantaj de *po*, ne povas akuzativigi. Se oni sekvas la modelon de tiu ĉi frazo, oni neniam eraras en la uzado de *po*. Eĉ se la drinkado de vodko estas rekomendinda por ĝuste uzi tiun laŭdire tipe slavan prepozicion, mi kuraĝe asertas, ke ĝusta uzado eblas eĉ por norvega aŭ japana alkoholibstinulo, se li scias nur, kio estas divido.

### Eĉ sen akuzativo la problemo ekzistas.

Mi ĵus montris, ke po-sintagmo ne povas esti objekto. Sed estas klare ankaŭ, ke ĝi ne povas esti subjekto. Kiel do klarigi la frazon

*Po du boteloj staris sur la tabloj,*  
kiu ŝajnas tute en ordo? Per la sama ĉi-supra analizo: la subjekto estas nur la vorto “boteloj” (oblo de “du” en tiu frazo: se estas kvin tabloj, boteloj estas ne du, se dek), “po du” estas adjekto, esprimanta la kvoton, kiu rezultas de la dispartigo. Tial, denove, por eviti miskomprenojn — kaj por ne eldiri la nepre eraran *\*po unu botelo staris* —, estas preferinde diri:

*Boteloj staris* (aŭ “*Staris boteloj*”) *po du / po unu sur la tabloj.*

Se “po unu”, la boteloj estas nepre pluraj.

### Ĉu alia solvo?

Tiuj, kiuj asertas, ke “post” *po* devas (ne nur povas!) stari akuzativigita o-vorto, logike laŭ sia logiko venis al la konkludo, ke *po* ne estas prepozicio, sed iu modifilo nur de la numeralo, do partikulo aŭ, laŭ tradicia gramatiko, iaspeca “adverbo”. Pluraj aŭtoroj defendis tiun tezon<sup>9</sup>. Ĝi povus validi, se ĉiuj frazoj reduktiĝus al la modelo *Al la infanoj mi donis po du pomojn*. Oni povus tiam teorii, ke al la frazo *Al la infanoj mi donis du pomojn*, oni aldonas la “adverbon” *po*, kiu signifus “postdivide”, sen sintaksa konsekvenco. Tiu ĉi teorio havas du malavantaĝojn. Ĝi devigus rigardi eraraj aŭ minimume arkaikaj ĉiujn Zamenhofajn frazojn laŭ la modelo *Al la infanoj mi donis po du pomoj*. Pli grave eĉ: ĝi malebligus la konstruon de frazoj, en kiuj la objekto reprezentas la tuton, laŭ la modelo *Mi legos la libron po 15 paĝoj ĉiutage* aŭ *Ĉiuj trinkis vodkon po unu glasoj*.

Kiel montrite ĉi-supre, eventuala elipso ne ŝanĝas la sintaksajn ecojn de la restantaj frazeroj. Diri, kiel kelkaj komentintoj, ke *po* povas esti laŭplaĉe prepozicio aŭ adverbo, respondas al la nesekvenda principo “pli bone mal-simple, ol simple”.

### Konklude

Kial do nomi la prepozicion *po* diabla? Ekzameninte ĝin pli serene, ni certe konkludos, ke ĝi estas senkulpe anĝela.

Ekzistas abunda literaturo pri tiu ĉi disputiga temo. Ĉiu aŭtoro faris interresajn rimarkojn, sed allasis erarajn ekzemplojn aŭ nekoherajn konkludojn.

La ĝis nun plej koheraj konkludoj estas tiuj de Kalocsay post polemiko pri *po* en 1948, al kiuj li donis la optimistan kaj pleonasman titolon “Definitiva fino pri *po*”<sup>10</sup>. Ordinara lingvo-uzanto eble rimarkigos, ke la polemikoj inter gramatikistoj estas, krom dubinde utilaj, kaprompaj, foje eĉ nekompreneblaj.

Multaj homoj atendas senduban instruon kaj precizajn instrukciojn. Eble tiajn homojn mi senesperigis per denova argumentado. Tial mi ne hezitas diri, ke la du frazoj el la Zamenhofa Ekzercaro sufiĉas por solvi la problemon, kaj ke nuna studlibro, kiu laŭ mia opinio plej ĝuste, plej klare kaj samtempe plej koncize prezentas la uzadon de *po*, estas la gramatiko de Miroslav Malovec<sup>11</sup>, kiun mi senhezite rekomendas al tiuj, kiuj serĉas klaran uzmanieron de tiu senkulpe malbenita vorteto.

### Notoj

1. Rossetti R. *Arto kaj naturo*. Budapest, 1989, pĝ. 75.
2. Cherpillod A. *PO la diabla vorto*. Courgenard, 1996.
3. Kalocsay K., Waringhien G. *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. Rotterdam, 1980, pĝ. 112.
4. Zamenhof L. *Lingvaj respondoj*. 7a eld., ed. G. Waringhien, 1990 (eld. de Ludovikito), pĝ. 114.
5. *Aktoj de la Akademio II 1968–1974*. Paris; Rotterdam, 1975, pĝ. 56.
6. Zamenhof L. *Fundamento de Esperanto*. 10a eld., ed. A. Albault, Pizo, 1991, pĝ. 259.
7. Baronnet F. *Lingvaj anguloj*. Laroque Timbaut, 1981, pĝ. 57.
8. Ekzemple en Zamenhof L. *Lingvaj respondoj*. 3a eld., Paris, 1936, pĝ. 47.
9. Spuroj pri ĝi troveblas en la *Plena analiza gramatiko* kaj en Wüster E. *Die Verhältniswörter des Esperanto*. 2a eld., Saarbrücken, 1968, pĝ. 15.
10. En *Literatura Mondo*, marto-aprilo 1948, pĝ. 59, post longa diskuto en la antaŭa numero.
11. Malovec M. *Gramatiko de Esperanto*. 2a eld., Dobřichovice, 2000, pĝ. 55–57.

# Kial fari Oficialajn Aldonojn?

de Bertilo Wennergren



La Akademio de Esperanto ĵus aperigis la *Naŭan Oficialan Aldonon al la Universala Vortaro*<sup>1</sup>, en kiu la Akademio de Esperanto oficialigis ankoraŭ 209 radikojn<sup>2</sup>, aldone al la jam antaŭe oficialaj 1977 lingvoelementoj, kaj aldone al la 2769 Fundamentaj morfemoj de Esperanto. La oficialaj kaj Fundamentaj elementoj do nun sumiĝas al 4955. (Pliaj statistikaĵoj legeblas Interrete<sup>3</sup>.)

Kunlige kun tiu okazaĵo mi iafoje aŭdas dubojn pri la indeco de oficialigado de radikoj. Ĉu tio entute havas (plu) sencon? Vere la afero povas ŝajni sufiĉe duba. Ĉu aliaj lingvoj havas distingon inter “oficialaj” kaj “ne-oficialaj” vortoj aŭ morfemoj? Ĉu nia vivanta lingvo ne povas evolui kaj bonfarti tute sen tiaj burokrataĵoj?

Kiel Akademiano, kaj precipe kiel direktoro de ties Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro (kiu ellaboris la *Naŭan Oficialan Aldonon*), mi tre bonvenigas tiajn dubojn kaj tiajn diskutojn.

## “Oficiala”, “ne-oficiala”?

Kiam oni parolas pri “vortoj oficialaj” kaj “vortoj neoficialaj”, tio vere povas ŝajni vana ludo. Ĉiokaze ĉiuj Esperantistoj, ankaŭ mi, kaj ankaŭ ĉiuj aliaj Akademianoj, uzadas apud la vortoj Fundamentaj kaj oficialigitaj, ankaŭ neoficialajn vortojn. Multaj neoficialaj radikoj eĉ estas tre oftaj, iuj el ili eĉ aperas multe pli ofte ol iuj Fundamentaj elementoj.

La problemoj estas laŭ mi la esprimoj “oficiala” kaj “ne-oficiala”. Ili estas tradiciaj, sed bedaŭrinde ili povas esti miskomprenigaj. Tio, kion la Akademio vere plenumas per siaj Oficialaj Aldonoj, estas verkado de vortaro, nome de la Universala Vortaro.

Jam en 1905, kiam aperis la *Funda-*

*mento de Esperanto*<sup>4</sup>, ĉiuj sciis, ke nia lingvo estas pli vasta ol la Fundamento mem, kaj ke ĝia vortprovizo estas pli granda ol tiu de la Universala Vortaro. Jam tiam ĉiuj, ankaŭ Zamenhof mem, uzadis ankaŭ elementojn, kiuj ne estis en tiu vortaro. Kaj ankoraŭ post 1905 li kaj ĉiuj aliaj uzadis ankaŭ ne-Fundamentajn radikojn.

Povas esti, ke iam iuj imagis, ke la celo de la oficialigado estas difini la sole ĝustan radikoprovizon de nia lingvo, opiniante, ke oni uzu ĉiam nur la Fundamentajn kaj “oficialajn” radikojn. Sed tio ne estas nun ĝusta, kaj fakte neniam estis ĝusta.

La Universala Vortaro kune kun ties Aldonoj estas unu el la multaj vortaroj de Esperanto. Tiuj vortaroj estas diversspecaj, kaj ili havas diversajn aŭtoritatecojn. La Universala Vortaro estas unu el la plej aŭtoritataj. Ĝi difinas la trunkon de forte rekomendataj radikoj, kiujn oni prefere uzu, kiam kaj kiom tio estas ebla. Malantaŭ tiu forta rekomendo staras Zamenhof, la Bulonja Deklaracio kaj la Akademio de Esperanto. Tial multaj atentis tiujn rekomendojn, sed certe ne sklave, nek centprocente, kaj tio estas tute en ordo. Pri devigado ja neniam temis. Tio estas klare legebla jam en la Fundamento mem<sup>5</sup>, kaj ankaŭ en la Bulonja Deklaracio.

La Universalan Vortaron pluverkas la Akademio (antaŭe Lingva Komitato) de preskaŭ cent jaroj (la Unua Oficiala Aldono aperis en 1909). Mi ne vidas kialon ĉesigi tiun verkadon. La lingvo daŭre evoluas kaj ĝia vortprovizo daŭre kreskas. Plu ekzistas bezono difini, kiuj el la multegaj radikoj de nia lingvo estas rekomendindaj kaj preferindaj, kaj plu ekzistas bezono, ke aŭtoritataj institucioj kaj vortaristoj

helpu pri unuecigado de la uzo per rekomendado de formoj kaj signifoj. Tiam laboron la Akademio faras per siaj Oficialaj Aldonoj. Iom similan laboron faras tiuj, kiuj verkas aliajn vortarojn, ekz. la *Plenan Ilustritan Vortaron*<sup>6</sup> (PIV). Ankaŭ tiuj vortaroj rekomendas iujn formojn, kaj foje ankaŭ malrekomendas aliajn, kaj ankaŭ tiuj vortaroj diversmaniere provas unuecigi la signifojn kaj uzojn de la lingvoelementoj. Sed neniu el tiuj vortaristoj kaj institucioj imagas, ke nur ties vortaro pravas, aŭ ke la lingvo konsistas nur el tio, kion enhavas kaj rekomendas tiu vortaro.

La Statuto<sup>7</sup> de la Akademio difinas interalie la taskon verki vortaron de Esperanto kun difinoj en Esperanto. Ĝuste tion la Akademio faras per siaj Oficialaj Aldonoj (kvankam antaŭe oni ofte neglektis la difinojn). Mi faros tion, kion mi povas fari por ke la Akademio daŭrigu kaj plibonigu tiun laboron. Fakte mi vidas neniu ajn kialon ĝin ne daŭrigi. Oni nur ne miskomprenu la karakteron kaj celon de tiu vortara laboro.

## Celo kaj celgrupoj

En la Enkondukita teksto de la *Naŭa Oficiala Aldono* mi skribis interalie la jenon:

Kiam la Akademio oficialigas radikon, tio formale signifas, ke ĝi aldonas tiun radikon al la Universala Vortaro, kiu estas parto de la Fundamento de Esperanto. Tio tamen ne signifas, ke la radiko fariĝas Fundamenta, ĉar Fundamentaj estas nur tiuj elementoj, kiuj troviĝas en la origina netuŝebla Fundamento. Praktike tia oficialigo havas la karakteron de forta rekomendo.

Devige gvidi la lingvouzon la Akademio nek povas, nek volas, sed ĝi esperas, ke ĝiajn rekomendojn la uzantoj de la lingvo atentos kaj trovos utilaj.

[...]

Grava celgrupo estas la vortaristoj, al kiuj ni rekomendas prezenti unuavice la oficialajn sencojn de la koncernaj vortoj. Tiujn la vortaristoj tamen povas kompletigi per pliaj sencoj neoficialaj laŭ la celo kaj bezonoj de la koncerna vortaro. Komprenoble neniel necesos citi niajn difinojn laŭvorte. Gravas la intencitaj ideoj.

“Oficiala” do esence signifas simple “aperanta en iu el la Aldonoj al la Universala Vortaro”. Tia vorto estas vorto en ampleksigita versio de la Universala Vortaro. Sekve neoficiala vorto estas vorto, kiu ne estas en tiu vortaro. Sed neniu vortaro enhavas ĉiujn vortojn de la lingvo. Oni do ne miskomprenu, ke neoficiala vorto laŭ la Akademio estas vorto ne-Esperanta, aŭ vorto kiun oni ne uzu, aŭ vorto malbona. Simile oni povas paroli pri elementoj “PIV-aj” (aperantaj en la Plena Ilustrita Vortaro), kaj pri vortoj “ne-PIV-aj”, pri radikoj “Zamenhofaj” (aperantaj en iuj el la tekstoj de Zamenhof), kaj pri vortoj “ne-Zamenhofaj”, k.t.p.

### Akademia Vortaro

En tiu ampleksigita versio de la Universala Vortaro oni tamen devas zorge distingi inter la origina Fundamenta parto, kaj la postaj Aldonoj. La Akademio esperas iam povi eldoni tiun tutan materialon en kompletigita formo, precipe kun oficialaj Esperantaj difinoj de ĉiuj elementoj, ankaŭ de la Fundamentaj. Sed por tiu celo ni uzas nun la nomon *Akademia Vortaro*. En provizora kaj nekompleta formo la Akademia Vortaro jam estas konsultebla en la Interreto<sup>8</sup>.

### Fortaj kaj malfortaj rekomendoj

Oni demandis al mi, kion mi celis, kiam mi skribis, ke “praktike tia oficialigo havas la karakteron de forta rekomendo”. Ĉu ekzistas ankaŭ malfortaj rekomendoj?

Laŭ la statuto de la Akademio ĝiaj “decidoj povas esti nuraj rekomendoj aŭ malrekomendoj, aŭ definitivaj aproboj aŭ malaprobaj”. Oficialigado de radikoj konsistigas aprobon. Praktike tamen la Akademio havas neniajn

rimeidojn (nek deziron) trudi siajn decidojn (ĉu aprobojn, ĉu rekomendojn). Kaj tial praktike la sola diferenco inter Akademiaj rekomendoj kaj Akademiaj aproboj, estas tio, ke la lastaj estas pli fortaj kaj pli firmaj rekomendoj ol la unuaj.

### Ĉu oficialaj difinoj kaj kunmetaĵoj?

Oni demandis al mi, ĉu ankaŭ la Esperantaj difinoj en la Naŭa Oficiala Aldono estas oficialaj. Kaj kio pri la diversaj vortkunmetaĵoj, kiuj tie aperas? Ĉu ankaŭ ili estas oficialaj? Principe la respondoj estas jesaj. Sed denove oni memoru, kion signifas ĉi-kuntekste “oficiala”. Ĝi signifas nur, ke la koncerna radikoj, vorto, kunmetaĵo aŭ difino troviĝas en vortaro de la Akademio. Ĝi signifas, ke la Akademio (forte) rekomendas tiun radikojn, vorton, kunmetaĵon aŭ difinon.

Iujn aliajn konsternis tio, ke en la Naŭa Oficiala Aldono entute uziĝas difinoj en Esperanto, dum forestas tradukoj en naciaj lingvoj. La diversaj Oficialaj Aldonoj estas enhave sufiĉe diversspecaj. Plej ofte la Lingva Komitato aŭ la Akademio uzis nur tradukojn por difini la radikojn kaj vortojn, sed uzo de Esperantlingvaj difinoj neniel estas io nova. Tiaj difinoj uziĝis jam en la Kvara OA (1929), kaj de tiam ili pli kaj pli graviĝis. En 7OA tute ne uziĝis tradukoj en naciajn lingvojn. En 8OA (1974) ĉefrolis la Esperantaj difinoj. Mi kaj multaj aliaj opinias, ke nia lingvo nun jam estas sufiĉe matura por povi difini siajn proprajn vortojn.

### Diversspecaj vortaroj

Iuj Esperantistoj — eble eĉ multaj — volas uzi, kiom eble, lingvoelementojn Fundamentajn kaj oficialajn. Ili faras tion ĉar ili rigardas la Fundamenton kaj la Oficialajn Aldonojn al la Universala Vortaro kiel verkojn aŭtoritatajn kaj sekvindajn. Kaj ili faras tion por helpi al la unueco de la lingvo, kaj por esti bone komprenataj. Multaj simile atentis pri tio, ĉu tiu aŭ jena vorto aŭ radikoj estas en la Plena Ilustrita Vortaro, ĉar ili rigardas tiun vortaron kiel aŭtoritatan, bonan kaj sekvindan (almenaŭ parte). En tio estas nenia kontraŭdiro aŭ konflikto. Nia lingvo bezonas diversajn vortarojn kun diversaj specoj de aŭtoritato kaj kun diversaj celoj.

Sed neniu vortaro, kiom ajn aŭtoritata laŭ ĝiaj uzantoj, estas perfekta. La Plena Ilustrita Vortaro enhavas erarojn, eĉ multajn, iafoje eĉ tre gravajn.

Ankaŭ la Universala Vortaro enhavas erarojn. Kaj ankaŭ la Oficialaj Aldonoj de la Akademio enhavas erarojn. Tial nepre ne sufiĉas unu sola vortaro. La diversaj vortaroj kompletigas unu la alian per siaj diversaj labormetodoj kaj diversaj celoj. PIV estas tre ampleksa vortaro, kiu eĉ enhavas vortojn tre marĝenajn, eĉ iujn vortojn apenaŭ uzatajn, kaj eĉ kelkajn vortojn, kiujn tiu vortaro mem malrekomendas. La Akademia Vortaro enhavas nur vortojn, kiujn la Akademio forte rekomendas, kaj ĝi mencias plejparte nur la plej gravajn kaj kernajn sencojn de tiuj vortoj.

### La Esperanta popolo

Espereble la Esperanta lingvokomunumo rigardas kaj plu rigardos la rekomendojn de la Akademio kiel utilajn kaj sekvindajn (tamen espereble neniu sekvos ilin blinde aŭ sklave), sed tio plene dependas kaj plu dependos de la reputacio de la Akademio. La Akademio estus nenio sen la bonvolo kaj kunlaboro de la Esperanta popolo. Mi esperas, ke la popolo trovos la ĵus aperintan Naŭan Oficialan Aldonon bona kaj uzinda, kaj mi esperas, ke tio kontribuos al bona reputacio (kaj al plia aŭtoritateco) de la Akademio.

Kaj mi esperas, ke oni estonte ĝuste komprenos la sencojn de la facile miskomprenbla, sed forte enradikiĝinta esprimo “oficiala radikoj”.

### Notoj

1. [http://akademio-de-esperanto.org/oficialaj\\_informoj/oficialaj\\_informoj\\_8\\_2007.html](http://akademio-de-esperanto.org/oficialaj_informoj/oficialaj_informoj_8_2007.html)
2. *La Ondo de Esperanto*, 2006. №11 (la tuta listo estis akceptita).
3. [http://akademio-de-esperanto.org/akademia\\_vortaro/klarigoj.html#statistikajhoj](http://akademio-de-esperanto.org/akademia_vortaro/klarigoj.html#statistikajhoj)
4. <http://akademio-de-esperanto.org/fundamento/>
5. <http://akademio-de-esperanto.org/fundamento/antauparolo.html>
6. Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris 2005.
7. <http://akademio-de-esperanto.org/faktoj/statuto.html>
8. [http://akademio-de-esperanto.org/akademia\\_vortaro/](http://akademio-de-esperanto.org/akademia_vortaro/)

Bertilo Wennergren, la Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro de la Akademio de Esperanto, volonte konsentis, ke la Naŭa OA aperu felietone en *La Ondo*.



# Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro

**adrenalin/o.** Hormono produktata de la surrenaj glandoj kaj sekreciata en la sangon okaze de mensa aŭ korpa premo (danĝero k.s.) por prepari la korpon al urĝa agado, fuĝo, sindefendo k.s.: *adrenalino akcelas la koran ritmon kaj altigas la sangopremon.* Formulo:  $C_6H_3(OH)_2-CH(OH)-CH_2-NH-CH_3$ .

**agres/i.** Ataki ne provokite; ataki kiel unua ne estante mem minacata de atako: *agresi personon; agresu landon.* **agres/em/a.** Ĉiam preta ataki, aŭ inklina kutime ataki, eĉ ne provokite.

**aidos/o.** Akirita malsufiĉo de la imunsistemo. Grava malsano, kiu malfortigas la korpajn defendojn kontraŭ ĉiaj malsanoj, plej ofte transdonata per seksaj kontaktoj aŭ infektita sango.

**akupunktur/o.** Kuracmetodo el la tradicia ĉina medicino, kiu konsistas en pikado de difinitaj korpopunktoj per pingloj.

**alergi/o.** Malsano kaŭzita de forta reago de la imunsistemo kontraŭ substancoj, kiuj normale estas sendanĝeraj, ekzemple manĝaĵoj, poleno, polvo k.s.

**algoritm/o** (en matematiko, komputado k.s.). Aro da precizaj reguloj aŭ preciza priskribo de la agoj farendaj por solvi problemon aŭ atingi celon: *algoritmo de obligado; la Eŭklida algoritmo; prezenti algoritmon per komputila programo.*

**ameb/o.** Unuĉela vivulo, sin movanta per ŝajnpiedoj (loboj aŭ fadejoj de ĉelinterna substanco), vivanta en akvo, malseka tero aŭ parazite en bestoj aŭ homoj, ofte ŝanĝanta sian formon. (*Amoeba, Entamoeba* k.a. parencaj genroj.)

**amend/i.** Ŝanĝi parton de leĝo, rezolucio aŭ simila teksto per formala proceduro: *amendi leĝoproponon; amendi rezolucion.* **amend/o.** Ago amendi kaj ties rezulto (tekstoparto amende ŝanĝita aŭ aldonita).

**anĉ/o.** Maldika elasta langeto, kies vibrado kreas la tonojn ĉe kelkaj instrumentoj, ekz. hobojo, klarneto kaj saksofono.

**Antarkt/o.** La regiono kaj kontinento ĉirkaŭ la suda poluso. **Antarkt/a.** Rilata al Antarkto; tia kiel (en) Antarkto: *la Antarkta Cirklo; Antarkta klimato; Antarkta glacio.*

**antibiotik/o.** Organika substanco produktata de mikroboj aŭ ĥemie sintetata, kiu povas malhelpi plimultiĝon

# Ade

de bakterioj kaj aliaj mikroboj, kaj eĉ ilin mortigi: *penicilino estas vaste uzata antibiotiko; multajn infektajn malsanojn oni kuracas per antibiotiko.*

**anus/o.** Malfermaĵo, kiu troviĝas ĉe la fino de la nutrokanalo, kaj tra kiu eliras la fekaĵoj (komunuze nomata *postajotruo*).

**aperitiv/o.** Trinkaĵo, ordinare alkohola, trinkata (kiel apetitivekilo) antaŭ manĝo.

**are/o** **1** Mezuro de surfaco: *ŝi mezuris la areon de la kampo; la areo de la ĉambro estas 20 kvadrataj metroj; tiu lando havas areon de pli ol cent mil kvadrataj kilometroj.* **2** Parto de surfaco; tereno: *tie estas parka areo, kie oni povas promeni; kulturata areo.*

**Arkt/o.** La regiono ĉirkaŭ la norda poluso. **Arkt/a.** Rilata al Arkto; tia kiel (en) Arkto: *la Arakta Oceano; la Arakta Cirklo; Arakta klimato.*

**asbest/o.** Mola griza fibra minerala substanco, el kiu oni povas fari teksaĵojn izolantan kontraŭ varmego kaj fajro.

[*Noto.* La oficialigita difino de *asbesto* bedaŭrinde enhavas eraron. Asbesto ne estas ĉiam griza. Tiu eraro estis malkovrita nur kiam estis tro malfrue por haltigi la oficialigan proceduron. La Akademio intencas iam oficiale ĝustigi tiun difinotekston.]

**aspirin/o.** Medikamento uzata precipe kontraŭ doloro, febro kaj inflamo, konsistanta el substanco kun la ĥemia formulo  $CH_3-CO-O-C_6H_4-COOH$ .

**avokad/o.** Frukto de avokadujo, kun verda aŭ bruneta ŝelo (el kiu oni povas ĝin manĝi), tre nutra, butereca karno, kaj unu sola tre granda malmola kerno. **avokad/uj/o, avokad/arb/o.** Arbo el tropika Ameriko, kies frukto estas avokado. (*Persea americana*.)

**banked/o.** Komuna ceremonia manĝo kun multaj partoprenantoj (por festi aŭ honori ion, ofte kun festparoladoj k.s.).

**baskul/o** **1** Aparato konsistanta el trabo, stango, tabulo aŭ simila afero, kies unu ekstremaĵo leviĝas, kiam la alia malsupreniras. **2** Ludilo konsist-

anta el tabulo aŭ stango, kiu estas ekvilibrita sur mezpunkto, kaj sur kies ekstremaĵoj povas sidi personoj alterne leviĝantaj kaj malleviĝantaj laŭ la movo de la tabulo aŭ stango. **3** Cirkvito, meĥanismo k.s., kiu analoge al baskulo *1* povas alterni inter du statoj.

**beletr/o.** Arta literaturo plezurocela aŭ distrocela, precipe tia, kiu rakontas pri okazaĵoj kaj personoj imagitaj. **beletr/aĵ/o.** Verko beletra. **beletr/ist/o.** Beletra verkisto aŭ specialisto.

**bemol/o.** Muziknota kromsigno, kiu montras malaltigon de tono: ♭.

**beton/o.** Konstrumaterialo, miksaĵo el sablo, ŝtonetoj, cemento kaj akvo.

**bit/o.** Pozicio de duuma cifero en duuma kodaĵo: *kontrolo parebito; la tria bito de la nombroprezento; ĉi tia memorĉelo povas enteni 32 bitojn; por prezenti tian nombron oni bezonas almenaŭ 10 bitojn.* **bit/ok/o.** Grupo de ok bitoj traktata kiel tutaĵo (kiel unuo en komputado k.s.).

[*Noto.* La Akademio lasas por posta konsidero la demandon, ĉu bito estu ankaŭ la nomo de la mezurunuo el informteorio, aŭ ĉu oni tiun nomu *ŝanono*.]

**bizon/o.** Sovaĝa remaĉanta parhufa bovosimila mamulo Nord-Amerika kaj Eŭropa. (*Bison bison, Bison bonasus*.)

**bluf/i.** Ŝajnigi sin supera al kontraŭulo por konduki tiun al eraro: *ne timu lian minacon, ĉar li blufas.*

**boac/o.** Arkta remaĉanta mamulo portanta kornojn (en la Fundamento nomata *norda cervo*). (*Rangifer tarandus*.)

**bradip/o.** Centr-Amerika kaj Sud-Amerika mamulo, kiu pendas de arbobranĉoj per la hokaj ungegoj de siaj tre longaj dufingraj aŭ trifingraj membroj, kaj sin movas tre malrapide. (*Bradypus*.)

**brit/o** **1** Ano de Britujo. **2** Ano de la antikva indiĝena gento de Britujo *1*. **Brit/uj/o** **1** Insulo en Eŭropo, inter Francujo kaj Irlando. **2** Regno, kiu inkluzivas Britujon *1* kaj Nord-Irlandon. Internacia landokodaĵo: GB.

**brokol/o.** Speco de legoma brasiko, parenca al florbrasiko, kun kapo verda (ĉe iaj specoj tamen violkolora aŭ eĉ blanka) konsistanta el nefirma floraro. (*Brassica oleracea italica*.)

*Daŭrigota*

## EAF: jubileo en la Nobelara Domo

La 28an de aprilo 2007 en Helsinko centdudeko da esperantistoj festis la centjariĝon de la Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF). El la Centra Oficejo de UEA venis tri gastoj: Ĝenerala Direktoro Osmo Buller, Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães kaj Francisco L. Veuthey, la deseginto de la jubilea poŝtmarko, kiun EAF presigis siakoste. Kelkajn tagojn pli frue alvenis la prezidanto, d-ro Renato Corsetti por prelegi en la Universitato de Helsinko kaj en la ĉefa biblioteko de Turku.


La unua festotaga evento nomiĝis historia kvizopromeno. Deko da esperantistoj rolis kiel eminentuloj de la pasinteco ĉe lokoj ligitaj kun la historio de EAF. Kvizemuloj vizitis kaj paroligis ilin por trovi respondojn al la kvizo. Dum la kvizo oni ankaŭ konatiĝis kun la Nobelara domo, kie okazis la solena fermo de la 14a UK en 1922 kaj kie nun okazis la jubileo.

La festprogramon gvidis Harri Laine. Estu menciataj la muzikaĵoj de Timo Väänänen per elektra kantelo kaj la surpriza danco *Mondnaskiĝo* (temo el *Kalevala*), kie la supren etenditaj nudaj kruroj, piedoj kaj piedfingroj de la dancistino, kun korpo kuŝanta en kaŝejo, esprimplene rerakontis la pramiton de finnoj pri la naskiĝo de la mondo.

Triopo el blindula E-asocio *Steleto* kantis i.a. la kanton *Polusstelo*, verkitan de Nino Runeberg kaj komponitan de Erkki Melartin por la unuaj finnaj esperantistoj komence de la 20a jarcento. Post la festparolado de Corsetti, oni havis rememoran momenton pri forpasintoj kaj neĉeestantoj kun muziko, dum kiu la dancistino disŝutadis freŝajn rozpetalojn sur la tablojn, plankon kaj sidantojn. En la fino oni kantis *La Esperon*.

En la vespera bankedo ludis kordensemblo *Virta* (Toronto). En etoso ĝuinda, nek formala nek teda, dum kaj post la manĝo okazis ĝenerala interparolado, fotado, salutoj, interkonatiĝoj.

Raita Pyhälä



## La brita movado provas renoviĝi

“Renoviĝo” estis la temo de la Brita Kongreso de Esperanto, kiu okazis 4–7 maj en la Ĝardenurbo Letchworth, norde de Londono.

La kongreso festis la centjariĝon de vizito de 500 partoprenantoj de la 3a Universala Kongreso de Esperanto en la apuda urbo Kemбриĝo, por viziti la novan ĝardenurbon, iniciatitan de esperantisto Ebenezer Howard.

La LKK bone kunlaboris kun la instancoj de la urbocentro, por starigi publikan spektaklon, en kiu Esperanto-kantisto Jomo kantis 25 kantojn en 25 lingvoj por starigi novan mondan rekordon por la fama rekordlibro de Guinness. La koncerto altiris multan atenton kaj intereson de la publiko. Estis disdonitaj preskaŭ trimil reklamfolioj pri la koncerto, kaj pendigitaj 50 afiŝoj. Dum la koncerto esperantistoj disdonis folion pri lokaj kursoj.

Renovigan sesion de la Esperanta Influgrupo, “Esperanto Lobby”, kiu antaŭe respondecis pri la plej granda nepartia grupo en la brita parlamento, gvidis profesoro Renato Corsetti, prezidanto de UEA. Li prezentis la aferon tiel, ke la homoj en la industrio kiuj ricevas plej altajn salajrojn estas ne la teknikistoj kiuj spertas pri la detaloj, sed la homoj kun komuna prudento, ĉar da ili estas malmultaj. Ĉiu esperantisto havas sian amatan ĉevaletan, li diris, sed malmultas homoj kun komuna prudento. La kunordiganto de “Esperanto Lobby”, Brian Barker, forlasis la movadon en 1999, sed revenis antaŭ jaro kiam li vidis ke iuj provas renoviĝi la movadon. Corsetti prelegis ankaŭ poste, en speciala aranĝo kun la Universitato de Liverpool.

Prelego de Ian Fantom pri la psikologio de Esperanta informado traktis ne la kutimajn aspektojn, sed informadon rilate al la interna ideo, ke unuigento ne regu alian. Li komparis la mondon eterne militantan kun epidemioj de kverelado en la Esperantomovado mem, kaj sugestis, ke por eltrovi la fundamentan kaŭzon de tiaj disputoj oni serĉu provokadon. Ĉu la mezorientajn konfliktojn kaŭzas religiaj, lingvaj kaj etnaj diferencoj, aŭ ĉu iuj uzas tiujn diferencojn por provoki interbatalojn?

Simile, ĉu la Ido-skismo vere estis malkonsento pri lingvaj ideoj, aŭ ĉu la afero estis provokita pro politikaj konsideroj? Kiu kontraŭis Esperanton? Neniu kontraŭis la lingvon mem, sed multaj kontraŭis la internan ideon. La esperantistoj ne estu naivaj tiurilate.

Viglan sesion pri Strategio de Esperanto gvidis Rolf Fantom, kun multe da partopreno de la ĉeestantoj.

Ankaŭ vigligis la partoprenantojn Klarita Velikova, prezidanto de Monda Esperanto-Ligo de Sporto, kiu uzas sporton por popularigi Esperanton. El la multaj afrikanoj kiuj provis veni, sukcesis nur Paul Kwasi Mensah, kiu prezentis afrikajn aferojn.

Ian Fantom

## Paradizo ankaŭ por esperantistoj

En aprilo okazis la 24a seminario en Ĉeĥa paradizo. Denove venis esperantistoj el Ĉeĥio kaj niaj amikoj el Nederlando, Francio kaj Svedio. Grupon de spertuloj gvidis nia fama Verda Lupo, Peter Breems, kiel konversacian rondon. Grupo de Margit Turková laboris pri fakaj aferoj, kaj grupo de Liba Filipová amuzigis per lernado mezgradajn partoprenantojn. En grupo de Jindra Drahotová aperis novuloj.

Pri sveda verkistino Astrid Lindgren prelegis svedino Kerstin Rohdin, kiu tradukis kelkajn librojn de Lindgren al Esperanto. Prelego de Claude Ferrand temis pri Israelo kaj nov-hebreja lingvo. Aleš Vávra klarigis al ni kiel per nova aparato oni mezuras kvanton de pluvo kaj neĝo. Francoj, kiuj venis per buseto kaj kun kato, prelegis pri paca movado.

La vetero estis favora al ni. Ankaŭ vicurbestroj en Mnichovo Hradiště kaj en Mladá Boleslav estis afablaj al ni kaj invitis partoprenantojn por vizito de siaj oficejoj.

JoDo



## PSI-raporto 2007

2–9 apr 2007 okazis la 23a PSI (Printempa Semajno Internacia) en la agrabla feriejo *Haus Venusberg* (Bonn, Germanio) kun 163 homoj el 22 landoj, inter kiuj eĉ Nepalo kaj Brazilo.

PSI estis, kiel kutime, organizita de familioj por familioj: haveblis programeroj por la infanoj kaj por la plenkreskuloj — kaj kompreneble la nemalhavebla knajpo (*G Kneipe*. *Drinkejo*)! Ĉeestis sufiĉe multe da junuloj, parte dank' al la plurtaga “SUB-18” — kunveno de GEJ (Germana Esperanto-Junularo) sine de PSI. Tamen, estis entute modela aranĝo kompare al multaj aliaj, kiuj ofte celas (aŭ atingas) nur unusaman aĝogrupon.

Menciindas la prelegoj de Claude Piron, la magia prezento de Christoph Frank kaj la koncerto (Boogie-woogie) de la konata Frank-Muschalle-triopo (ruze malfermita ankaŭ al ne-esperantistoj).

Kaj nun malpli kutimaj novaĵoj...

Aŭtenta fantomo hantis la partoprenantojn en bele elpensita ludo kiu estigis konversaciojn kiaj “La kioman fojon vi ĉeestas al PSI?” kaj “Miaj piedoj estas tro grandaj!” Tamen ne okazis Kazohinia freneziĝo! Jen la klarigo: la organizantoj donis poiome etan indicon pri la identeco de la fantomo, inter kiuj la ŝugrandeco kaj la nombro de ties PSI-ĉeestoj...

La organizantoj gastigis flandran reĝisoron kiu faris testfilmetojn prepare al serioza, originala longfilma projekto. Cetere venis ankaŭ ĵurnalistoj kaj filmskipo por la loka televido, kiu dediĉis plurajn minutojn al la Esperanto-renkontiĝo kaj aperis artikoloj en pluraj ĵurnaloj.

Lode Van de Velde

## En la peterburga universitato

Finiĝas la akademia jaro, kaj ankaŭ ĉi-jara studado de Esperanto en Sankt-Peterburga Universitato. La kursoro finis entute ses personoj, kaj ĝi daŭros sekvajare kiel deviga kurso enkadre de tiel nomata programo pri ekzotikaj lingvoj.

Dum la kurso estas instruata ne nur Esperanto mem, sed ankaŭ sociolingvistika rigardo al ties ekzisto kaj evoluo. Gestudentoj havis du horojn semajne kaj konatiĝis kun Esperanto plejparte dank' al modernaj revuoj (inter kiuj plej multe estis uzata *La Ondo de Esperanto*) kaj son-materialo (retradio).

Oksana Burkina



Aroma Jalto (Fotis Volodimir Hordijenko)

## Jalto denove aromas

La 19a Aroma Jalto unuigis 110 homojn el 8 landoj. Funkciis kvar lingvaj grupoj: komencanta (gvidis Anna Maksimĉuk), komencinta (Alisa Nikitina), paroliga (Tatjana Auderskaja), perfektiga (Marta Kovács).

Krom kutimaj ekskursoj kaj piedmarŝoj al memorindaĵoj de Granda Jalto okazis dutaga marŝo al la kaverno de Ĉatirdag. Koncertis Pavel Mojaev, Nadejda Kuleŝova, pola koruso *Verda velo*. En la Universitato prelegis Paulo Branko, Pavel Mojaev, Andrzej Grzebowski, Aleks Kadar, Tatjana Auderskaja kaj Manfred Kirsch.

Volodimir Hordijenko

## Akademiaj novaĵoj

En aprilo 2007 finiĝis la elekto de triono de la membroj de la Akademio de Esperanto (AdE).

**Nove elektitaj:** Paul Gubbins, Katalin Kovács, Mauro La Torre, Ma Young-tae, Barbara Pietrzak, Saka Tadas. **Reelektitaj:** Gerrit Berveling, Renato Corsetti, Christer Kiselman, Ilona Koutny, Jouko Lindstedt, François Lo Jacomo, Geraldo Mattos, Brian Moon, Baldur Ragnarsson.

AdE en 1999 starigis la *Konsultejon de la Akademio*, al kiu oni povas turni sin per lingvaj demandoj por ricevi konsilon aŭ rekomendon. *La respondoj ne estas decidoj de la Akademio de Esperanto, sed rekomendoj de la membroj de la Sekcio*; tamen AdE esperas ke utilas tiu ĉi rapida servo, kiel pruvis la praktiko de la lastaj jaroj, kiam la Konsultejon gvidis Stefan Maul. La Akademio ĵus reorganizis la Konsultejon, kiun provizore, ĝis elekto de nova direktoro, prizorgas Boris Kolker.

(Laŭ *Oficialaj informoj de AdE*)

## KEA omaĝis pioniron

Ekde 1999 Korea Esperanto-Asocio (KEA) festas la Tagon de Pioniro en majo, omaĝe al forpasintaj pioniroj. Ĉiujare KEA eldonas memorlibron pri la prilumata pioniro kun liaj/ŝiaj verkoj, resuma biografio, kaj rememoroj pri la pioniro verkitaj de la amikoj, posteuloj kaj familianoj.

Ĉi-jare la Tago de Pioniro okazis 12 maj en Hankuk Universitato de Fremdlingvaj Studoj. Oni omaĝis la pioniron Elpin An U-seng (1907–1991) per 203-paĝa memorlibro *La Literatura Mondo de Elpin*, verkita de Lee Young-Koo. Ĉeestis ĉ. 70 partoprenantoj — esperantistoj kaj familianoj de la honorata pioniro.

An U-seng, naskita en norda Koreio, estis patrioto kontraŭ japana kolonia regado de Koreio. Li aktivis en Ĉinio, kie li lernis Esperanton en la universitato Zhungshan. Li verkis en Esperanto poemojn kaj novelojn, kaj tradukis multajn koreajn kaj ĉinajn novelojn. Unu el ili estas *La taglibro de frenezulo* de Lu Sin.

En siaj verkoj li kondamnis maljustecon de la japana imperio, akuzis militan kruelon kaj agitis por kontraŭjapana movado kaj por korea sendependiĝo.

Kim Uson

## Festa renkontiĝo en Braziljo

Por festi la 45-jariĝon de sia fondo (21 apr 1962) Esperanto-Asocio de Braziljo (la ĉefurbo de Brazilo) okazigis 20–22 apr sian 4an Esperantan Renkontiĝon.

La unuan tagon pli ol cent personoj kunvenis en urbocentra salono de la religia organizaĵo *Legio de la Bona Volo*. Post omaĝo al karmemora ĵurnalistoj Mário Garófalo, kiu subtenis Esperanton en radio *Brasília Super Rádio FM*, Eurípedes Barbosa prelegis kaj projekciis pri 100 jaroj de brazila Esperanto-movado, kaj instruisto Jair Salles rakontis pri frateco de la esperantistoj. En la arta parto sin prezentis kantante Flávio Fonseca, grupo *Nova Erao kaj Euzébio* kaj juna pianisto Lucian Ramos.

Dum la du sekvaj tagoj la renkontiĝo daŭris en la bieneto *Esperanto* apud Braziljo. En la bieneto krom prelegoj gviditaj de Jair Sales, rond-table oni diskutis la demandon *Kiel rapidigi la progreson de la Esperanto-Movado*. Raporto pri la diskutado estis sendita al la diversaj diskut-listoj en Brazilo.

Wilson Oliveira





## Esperanto en Eŭropa Parlamento

**(Vide el Bruselo) En granda ceremonio okaze de la 50-jariĝo de la Roma traktato, fondinta la Eŭropan Komunumon, nobelpremiito Selten propagandis Esperanton.**

Alparolante grandan aŭskultantaron en la Eŭropa Parlamento, Reinhard Selten, kiu ricevis la premion por sia kontribuo al ekonomiko en 1994, revuis la grandajn paŝojn en Eŭropo al ekonomia integriĝo.

“Daŭris tre longe, sed fundamentaj ŝanĝoj estas politike plenumitaj. Multon oni longe rigardis neeble, ekzemple la Monan Union”, — diris Selten la 9an de majo, je la Eŭropa Tago. Selten troviĝis inter 13 nobelpremiitoj, invititaj por festi la Eŭropan Tagon.

Kvankam Eŭropo montris mirindan progreson al ekonomia integriĝo, ĝi malsukcesis fortigi la eŭropan identecon pro lingvaj baroj. “Necesas stimuli la ekeston de pli forta eŭropa identeco. La eŭropanoj devas lerni senti sin unuavice kiel eŭropanoj, — argumentis Selten en la ĉefsalono de la Eŭropa Parlamento. — Grava malhelpaĵo sur la vojo al pli forta eŭropa identeco estas la lingvaj baroj ene de Eŭropo. Tiu lingvoproblemo postulas solvon. La superrego de unu nacia lingvo ne povas esti la solvo. En la longa daŭro nur neŭtrala solvo estas akceptebla. Neniun nacion ni rajtas malavantaĝigi”.

“Facile lernebla planlingvo, kiel Esperanto, ebligas neŭtralan solvon de la lingvoproblemo. Duan fremdlingvon oni lernas multe pli facile ol la unuan. La dualingva efiko estas tiom forta, kaj Esperanto tiom facila, ke estas pli favore unue lerni Esperanton kaj poste nacian fremdlingvon, ol nur tiun fremdlingvon solan. Tio estas

science pruvita per lerneaj testoj, — aldonis Selten kaj daŭrigis: — Unue kelkaj landoj povos fari traktaton pri lerneja instruado de Esperanto. Poste oni povos vastigi tiun traktaton al aliaj landoj. La vojon de traktatovastigo oni plurfoje iris sukcese, ekzemple pri la Schengen-Traktato kaj la Mona Unio”.

Franca aktivulo Henri Masson trovis kelkajn kuriozaĵojn en la gazetara komuniko koncernanta la akcepton de 13 Nobelpremiitoj. «Unue, la diverslingvaj versioj de la raporto pri tio malsimilas kaj, en la angla, kutime konsiderata kiel “referenca” lingvo, oni povas legi, ke la “big supporter of Esperanto” [granda subtenanto de Esperanto] estas ne Reinhard Selten, sed Martinus Veltmann», — rimarkis la atentaj okuloj de Masson. Veltmann estas fama fizikisto.

Laŭ Masson ne temas pri eraro de la prezidanto de la Parlamento Hans-Gert Pöttering. La mencio, en la enkonduka parolado de Pöttering, pri “granda subtenanto de Esperanto” por alia persono ol Selten, aperis en la angla komuniko, sed ne en la franca.

La parolado de Selten provokis vivan interŝanĝon de opinioj inter esperantistoj. Anton Oberndorfer de Aŭstria Esperanto-Movado, plene konsenta kun la argumentoj de Selten, atentigas pri “necesa” kondiĉo por ke Esperanto estu akceptata de la homoj. “Esperanto devas alporti simpation, do necesas homoj kiuj radias simpation kiam ili parolas en Esperanto. Ili tiel fariĝos simpatiportantoj por la lingvo. Ĝuste se temas pri enkonduko de lin-

gvo, la sciencaj argumentoj povus esti trafegaj, sed se mankus simpatio, la plej bonaj argumentoj ne helpas”, — opinias Oberndorfer.

“Kaj se temas pri simpatio, junaj belaj virinoj taŭgas certe pli ol maljunaj profesoroj aŭ prezidantoj de E-asocioj”, — argumentas Oberndorfer. Franca esperantistino Mireille Corobu komentas: “Vi forgesas junajn belajn virojn! Mi preferas renkonti belan junan viron kun normala T-ĉemizo kiu propagandas nian lingvon... Simpatia juna persono, kiu prezentas nian lingvon, pli allogas ol maljunaj profesoroj aŭ prezidantoj de E-asocioj”. Sed usona aktivulo Alexander Shlafer malsamopiniis: “Stranga kontrastigo... Mi renkontis tre simpatiajn maljunajn profesorojn kaj forpuŝe malsimpatiajn junajn belajn virinojn”.

Ankaŭ itala esperantisto Eugen Fabian havas dubojn pri la teorio de Oberndorfer. Laŭ Fabian, se instruante Esperanton oni ne povas pagi la luprezon, oni serĉos alian laboron kaj instruos Esperanton nur post la emeritiĝo: “Juna instruisto de la angla havas avantaĝojn kompare kun samaĝa esperanta instruisto. La unua estas pagata. La dua malofte. La unua aŭdas de ĉiuj ke la lingvo, kiun li instruas, estas nemalhavebla en la hodiaŭa vivo. La dua aŭdas ripete ke la lingvo, kiun ŝi/li instruas, valoras nenion kaj estus pli bone studi anstataŭe iun el la vivaj lingvoj”. En ĉi tiuj kondiĉoj, Fabian notas ke eĉ la memestimo de la esperanta instruisto kelkfoje povas suferi.

**Dafydd ab Iago**

## Leterkesto

Min interesis multe la intervjuo kun Sinjoro Dasgupto en la maja numero de *La Ondo*. Ĝi pensigis min pri la sekva ideo: proponi Esperanton kiel propedeŭtikan ilon por la lernado de la angla. Iu merito de tiu strategio dependus je nivelo de Esperanto atingebla en la proceso. Mi danke akceptus informojn ĉi-rilate de la spertuloj.

**Breandán Ó Mearáin**, (Norda Irlando)

*La Ondon* mi nun regule ricevas la trian sabaton de la monato (ĉar polaj poŝtaĵoj de jardekoj atingas min nur sabate), tri semajnojn post la sendo el Olsztyn. Malgraŭ la poŝta prokrasto, ne malofte okazas, ke mi legas raporton pri franca okazaĵo antaŭ ol legi ĝin en francaj E-gazetoj. Ĉi-foje temas pri Mediteranea Esperanto-staĝo. Mi ĉiam legas la tutan enhavon kun intereso. Dankon al vi!

**Luiza Marin** (Francio)

Ĉiam mi tre ĝojas, kiam alvenas nova numero de via revuo. Dum la lastaj jaroj vi trovis vian tipan profilon kaj vi meritas grandan laŭdon pro via senlaca kaj tre talenta agado.

150 sinsekvaj numeroj, alta ekstera, lingva kaj enhava nivelo: mi esprimas mian grandan respekton kaj kore gratulas al vi ambaŭ kaj al viaj kunlaborantoj. Via revuo ne sekvas nur unu vidpunkton, sed permesas al multaj personoj esprimi sian opinion, same vi neniam ofendiĝis pri kritikoj, tio montras vian redakcian suverenecon. Mi tre esperas, ke ankoraŭ venados en niajn manojn multaj eldonoj kaj jarkolektoj de LODE.

Aldone mi deziras esprimi mian ĝojon pro *Paĝoj el la historio de la Sukcena lando* de la redaktoro Halina Gorecka. La enhavo de la artikoloj pruvas profundan scion de tiu temo kaj bonan konon de diversaj, seriozaj fontoj.

**Werner Pfennig** (Germanio)

## Pri la valoro de nia gazetaro

Gratulon pro la interesa analizo pri esperantista gazetaro de Jukka Pietiläinen aperinta en via gazeto (LODE-150).

Eĉ se la ebleco interŝanĝi kaj navigi surrete certe malfermis grandajn eblecojn al la esperantista komunumo, la paperaj gazetoj restas laŭ mi gravaj kaj pli agrable legeblaj. Mi mem sper-tis tion abonante *Monaton* unujare nur rete, mi tutsimple forgesis ĝin legi, kaj reabonis perpoŝte por ĝin ĝui ne nur antaŭ mia komputilo.

Kompreneble nia gazetaro pli modestas ol la nacilingvaj gazetoj, sed ankaŭ tiuj lastaj suferas grandan konkurencon kun la reto kaj kun la senpagaj gazetoj, kiuj malvalorigas la ĵurnalistan laboron kaj kutimigas la novajn generaciojn pri senpageco de la informoj. En niaj naciaj lingvoj la plureco de la gazetaro estas grave minacata, kaj en mia regiono ekzemple bona svisromanda gazeto provanta ne tro dependi de reklamado devas alvoki al financa subteno (ekster la abona kosto) de siaj legantoj por sin vivteni. Se, kiel diris la aŭtoro, “sendependa gazetaro estas utila por demokratio”, des pli utilas ĝia plurvoĉeco. Kaj en Esperantio ĝuste ne de tiom da jaroj oni povas gustumi plurecon de la opinioj en la esperantaj gazetoj. Al tiu plureco kontribuis, inter alie, *La Ondo*, sed ankaŭ lastatempe la ofte kritikata reta gazeto *Libera Folio* kaj pluraj aliaj gazetoj cititaj en la artikolo.

Tial mi forte malkonsentas, kiam Jukka Pietiläinen volas redukti la nombron de gazetoj por ilin pli fortigi. Certe pluraj esperantistaj gazetoj grafike prezentiĝas modeste kaj foje eksmode, ili postulas grandan laboron de redaktisto plej ofte ne profesinivela, uzanta modestan tekstlaborilon, kaj necesigas relative grandajn kostojn. Tio estas interalie la kazo de *Etnismo*, kiun la aŭtoro menciis ĝuste kiel gazeton indan je malapero profite al la plej legata *Monato*. Certe tio estas rekono pri la kvalito de la enhavo de *Etnismo*, kaj efektive ambaŭ gazetoj estas nemovadaj kaj raportas pri politikaj temoj tutmondaj, kaj foje artikolo taŭgus por ambaŭ. Sed *Etnismo* estas la organo de Internacia Komitato por

Etnaj Liberecoj (IKEL), kiu engaĝiĝas por la rajtoj de la senŝtataj popoloj kaj, ekde 1972, *Etnismo* regule raportas pri tiuj popoloj. Ĝi fake kaj profunde esploras la kulturon kaj la problemojn de etaj popoloj, foje apenaŭ konataj de la ĝenerala publiko. En tio *Etnismo* unikas en Esperantio, kie malmultaj asocioj politike engaĝiĝas.

En 2002, kiam Uwe Moritz, ĝia fondinto kaj ĝistiam redaktisto, anoncis sian retiriĝon, la konsterno estis granda inter la legantoj de *Etnismo*, timantaj, ke neniu transprenos la postenon. La revuo plu vivas, kaj ĝia abonantaro, eĉ se ĝi modestas (tio normalas ĉar la temo interesas nur parton de la esperantistoj), stabilas kaj eĉ trankvile altiĝas. Tio pravas, ke *Etnismo* plu indas je apero, kiel pluraj aliaj esperanto-gazetoj, kiun la aŭtoro ne menciis, ekzemple, *La Gazeto* kun alta kulturnivelo kaj specifa voĉo.

Kiel la aŭtoro de la artikolo prave konstatis: “disvastigo de informoj pri ekzisto de bonaj esperanto-gazetoj estas problemo”. Sed bedaŭrinde foje malfacilas aldoni al la redakta laboro la publikajn rilatojn, kiuj certe alportus pli da abonantoj.

Mi kredas en la valoro de nia gazetaro malgraŭ ĝiaj malfortoj, kaj iam preferas legi ilin ol la neesperantistan gazetaron pli luksan sed pli kaj pli submetitan al la ekonomia povo, kiu pagas ilin.

**Nicole Margot**  
redaktistino de *Etnismo*

## Ruslando aŭ Pollando

Kiam niaj rusaj, tre aktivaj, samideanoj volas nin inviti al UK-2009, kun apogo de regantaj gravuloj, ni devas kun ĝojo kaj kontento absolute akcepti tian promesplenan proponon.

Konsiderante, ekzemple, la seriozan eldonaktivecon de *Sezonoj*, ĝian respondecon por klasika rusa literaturo, la rusaj organizantoj de UK en Moskvo povus persvadi grupeton de lertaj profesiaj geaktoroj rusaj prezenti en tre klara Esperanto iun el la famaj dramoj de Ĉeĥov, aŭ, ekzemple, *La Revizoron* de Gogol, tradukitan el la rusa originalo de nia spirita patro Ludoviko Zamenhof, kiu ja estis studinta medicinon en Moskvo.

Niaj bravaj polaj samideanoj, kiuj impone organizis kvar UKojn, povus sen ia ajn prestiĝ-perdo atendi ĝis la jaro 2012, kiam Esperanto atingos la 125-jaran jubileon.

**Bertil Englund** (Germanio)



## Ségolène Royal por Esperanto

En la maja *Ondo* aperis favora opinio pri Esperanto de Marie-Georges Buffet — komunisto kandidato por la prezidenteco en Francio. Intertempe, ankaŭ la socialista kandidato, Ségolène Royal (sur la supra foto), respondis al demando pri Esperanto:

*Vi skribis al mi la 7an de la lasta monato Marto por konsciigi min pri la intereso enkonduki fakultativan ekzamenon de Esperanto en la abiturienta ekzameno.*

*Kun multe da atento mi konatiĝis kun viaj argumentoj favore al tiu lingvo. Se mi estos elektita al prezidenteco de la Respubliko, en venonta Majo, mi tuj kunvenigos Ĝeneralajn Statojn [t.e. reprezentantojn de sociaj grupoj] por debati kun ĉiuj lernejoj agantoj kaj partneroj pri la estonteco de la edukistemo, kiu reprezentas, miaopinie, absolutan prioritaton de mia politika agado. En tiu kadro, la sugesto pri enkonduko de Esperanto, kiel instruobjekto, estos pritraktata.*

Sed Nicolas Sarkozy estis elektita.  
(*Gazetara Servo de SAT-Amikaro*)

Esperanto-Asocio de Finnlando  
1907-2007  
invitas al festivalo  
**Arta Lumo**  
- Kuopio Finnlando  
27.7-1.8.2007

Por aŭtomate ricevi aktualajn informojn:  
sendu vian reladreson al [Arta.Lumo@esperanto.fi](mailto:Arta.Lumo@esperanto.fi)  
aŭ vian adreson al EAF/Arta Lumo,  
Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki  
[www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi)

**Sukcena Ondo**  
**Jubileo en Kaliningrado**  
**17-19 aŭg 2007**



## Kunvojaĝu per “Kunvojaĝu”

Gubbins, Paul. *Kunvojaĝu: Praktika Esperanto-kurso por studentoj kaj plenkreskuloj*. — 2a eld., rev. — Pisa: Edistudio, 2006. — 240 pĝ., il.

La recenzata internacia kurso, aperinta unuafoje en 1993, estas bona ekzemplo de (rara en la Esperantomondo) lernolibro, orientita al reala komunikado. Tia estas la pozicio de la aŭtoro mem: “ĝi ne estas lernolibro por aŭtodidaktaj”. Tio signifas, ke jam de la komenco subkompreniĝas, ke ekstudinto ne sidos sola antaŭ mistera foliaro, sed akiras lingvaĵon el neevitebla interkomunikiĝo, tuj provos kontakti aliajn per la nova komunikilo. (Ne malkomprenu min pri aŭtodidakteco kaj mistera foliaro — ankaŭ tion mi trovas bona kaj interesa sialoke). El tiu praktiko sekvas plia memfido en parolo, ne ekzistas kutima granda baro por salti de skriba-lega posedo al la buŝa.

Kroma kontribuo al estonta komunikpovo de studentoj estas la dialoga formo, en kiu la lingvo estas ĉefe prezentita — temaj dialogoj, rolludoj, demandoj k.s. Krom la dialoga formo prezentiĝas ankaŭ variaj funkciaj stiloj: oni legas verbaĵojn kaj veterprognozon, deklaraĵon kaj kuirrecepton, oni skribas vivresumon kaj kontrakton, oni plenigas aliĝilon kaj mendilon...

Aparta avantaĝo estas la elektita temaro. Tute subtenindas la penso de Paul Gubbins, ke unu el la kialoj de malmulta praktika uzado de Esperanto povus esti la enuiga temaro de klasikaj lernolibroj, kiu malfacile ligiĝas kun praktika vivo — klasike oni diskutas plumamikojn, historietojn pri lernantoj, hobiajn... Paul Gubbins prave proponas temojn pli proksimajn al la vivo: komercaj interparoloj, pertelefonaj interparoloj, interparoloj en oficejo, interparoloj por surstrata orientiĝo, interparoloj en hotelo, kafejo, flughaveno ktp.

Krom komunika aliro la libro enhavas iom da aliro struktura — ĝi havas apartan malgrandan prigramatikan parton fine de la libro, al kiu oni povas referenci. Malmultaj gramatikaj rimarkoj estas ankaŭ pozicio de la aŭtoro — “gramatiko nature elmergiĝu el la lingvo mem”, t.e. el la praktiko. Tio apenaŭ estas malavantaĝo de la libro, ĉar en Esperanto ne mankas gramatikaj teoriemaj libroj. Mankas ĝuste komunik-orientitaj lernolibroj — kaj tiun mankon *Kunvojaĝu* parte kovras.

Oksana Burkina

## Nepre havinda por ĉiu Esperanto-biblioteko

Migliorini, Bruno. *Lingvaj aspektoj de Esperanto*. (1924–1963). Eeseoj. — Enkond. Carlo Minnaja, Tullio De Mauro. — 2a eld., rev. — Pisa: Edistudio, 2006. — 112 pĝ.

Nepre havinda por ĉiu Esperanto-biblioteko estas la kolekto de esperantologiaj kaj interlingvistikaj eseoj de Bruno Migliorini.

Bruno Migliorini (1896–1975) estas konata itala lingvisto, interalie prezidinto de la Itala Lingva Akademio kaj aŭtoro de la ĝis nun aktuala *Historio de la itala lingvo*. Estas tre bonŝance por italaj esperantistoj, ke tiagrada renoma lingvisto interesiĝis ankaŭ pri esperantologio kaj postlasis kelkajn verkojn interesajn ankaŭ nun kiel printaĵo de la tiama stato de la scienco. Esperantistiĝinte en 1913, tiam 16-jara, Migliorini tuj fariĝis fervora aktivulo, en la sama jaro li fondis Esperanto-grupon en sia urbo. Li multe involviĝis en la Esperanto-movado — kaj eble lia elekto de la lingvistika kariero estis fierinda por ni sekvo de lia esperantisteco.

La eseoj kovras vastan temaron, kiu respegulas vastecon de la interesoj de la itala elstarulo kaj lian enorman produktivon. Menciindas ankaŭ la lingvaĵo: la tekstoj facile legeblas kaj foje vekas intereson pli pro la maniero de la aŭtoro, ol pro la elektita temo (ekzemple, en *La akcento en Esperanto kaj en Occidental*). Krom la kritiko de

Occidental, la esearo enhavas ankaŭ kritikan tekston pri interlingvao (*Esperanto kaj Interlingua*). Aliaj tuŝitaj temoj estas etimologio de Esperanto (*Kontribuaĵoj al Esperanta etimologio*), pruntoj de vortoj en eŭropaj lingvoj lige kun historiaj eventoj (*La elementoj de la eŭropa vorttrezoro*). Ekzemploriĉa eseo *La artefaritaj elementoj en la naciaj lingvoj* donas bazon por la populara esperantista diskursero “ĉiuj lingvoj estas iugrade artefaritaj”. *La personaj nomoj* rakontas pri deveno kaj uzo de nomoj en diversaj kulturoj. La libro finiĝas per Esperanta traduko de eseo *Dante homo kaj poeto*, kiun Migliorini verkis itale por la dulingva (Esperanto-itala) eldono de *La Dia Komedio* (1963).

La preskvalito estas tre bona, la teksto estas facile legebla. Renkonteblas kompost-eraroj, kvazaŭ la tajpinto ne tre bone sciis Esperanton (ekzemple, en pĝ. 35: “ai” anstataŭ “al”, kelkajn liniojn poste “al” anstataŭ “ol”).

La esearo tre bone sentigas al modernuloj, kio estis aktuala en esperantologio de la periodo inter la mondmilitoj (bedaŭrinde post 1938 Migliorini ne plu okupiĝis pri Esperanto, kvankam li plu amikis kun esperantistoj). Ĝi ankaŭ ebligas, per la enkondukaj eseoj, pli proksiman konatiĝon kun historio de Esperanto-movado en Italio.

Slavik Ivanov

## Ĝelazny verkos libron pri Zamenhof

Prof. d-ro hab. Walter Ĝelazny, rektoro de universitato en Pollando, jama Konsulo de la Esperanta Civito, akceptis la proponon de la ĝenerala Asembleo de LF-koop verki historiografie kaj sociologie valoran libron pri Lazaro Ludoviko Zamenhof.

La Asembleo pensis pri verko kiu kunigu la elementojn de biografio kun la analizo pri la pensaro. Zamenhof estus prezentita kiel unu el la plej rimarkindaj personecoj en la moderna historio. Temus pri disvolvo de la tezoj de sen. Ĝelazny, jam prezentitaj parte kaj koncize en *Literatura Foiro, Esperantologiaj Kajeroj* kaj aliloke.

La libro estos en la pola, tradukota al aliaj lingvoj. Etnolingve ĝi devus aperi ĉe elstara eldonejo pri historiografiaj tekstoj, en esperanto ĝi aperos ĉe LF-koop, kiel kontribuo al la Zamenhofa Jubileo 2009. Ne temos pri enciklopedieca kaj snobe faka verko: ĝi taŭgos por tiaj relative popularaj, kvankam tre seriozaj, serioj pri la granduloj de la homaro, troveblaj en ĉiu grava lingvo — do eble 150 ĝis 200 paĝoj.

Dankante pro la konfido de la kooperativo, Ĝelazny komentarias:

“Kvankam Zamenhof post multaj hezitoj kaj provoj finfine ekstere traktis sin kosmopolito, homo de Haskala, fine la homo de la epoko, li kaŝis specife ne nur sian judecon, sed tutan mondkoncepton. Foje sciencan, alfoje profete-naivan. Fine li kaŝis multajn ideojn, kiuj anoncadis novan epokon, kiuj poste aperis kiel multkulturalismo, mestiziĝo ktp”.

Profesoro Ĝelazny ekverkos la libron en aŭtuno 2007.

HeKo





## Mil Esperanto-fotoj en la reto

La Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko kunlabore kun “Bildarchiv Austria” komencis katalogigi kaj skani siajn 30 mil fotojn kaj 10 mil aliajn objektojn kun Esperanta temo.

Jam mil skanitaj fotoj estas videblaj en interreto: [www.bildarchiv.austria.at/default.aspx](http://www.bildarchiv.austria.at/default.aspx). Poste enlaboriĝos ĉiuj fotoj kaj aliaj objektoj de la Esperantomuzeo: desegnoj, pentraĵoj, afiŝoj, poŝtkartoj, bildkartoj, poŝtmarkoj, insignoj, steloj, ŝildoj kun Esperanta surskribo...

Eblas elŝuti la skanaĵojn senkoste en meza kvalito kaj kun ioma krompago en altega kvalito. Tio estas granda oferto ne nur por la diversaj Esperanto-revuoj, kiuj serĉas historiajn bildojn, sed ankaŭ por sciencistoj, kolektantoj kaj la simpla samideano.

La priskriba lingvo de la “Bildarchiv Austria” estas la germana. Eblas serĉi per la vorto *Esperanto* kaj aldona vorto. Ekzemple, per la serĉvortoj *Esperanto* kaj *Wien* vi ricevas bildojn de Esperanto-okazaĵoj en Vieno. Aranĝojn oni povas trovi ankaŭ laŭ la Esperanta nomo. Ekzemple, *Universala* kondukos vin al ĉiuj fotoj de la Universalaj Kongresoj.

Gesamideanoj, garantiu, ke viaj historiaj Esperanto-fotoj kaj -dokumentoj ne perdiĝu! Sendu ilin al la Esperantomuzeo, kiu dece kaj konvene konservas ilin:

✉ Esperantomuzeo, Nationalbibliothek, Postfach 308, A-1015 Wien

**Herbert Mayer**

**Sur la supra foto:** Esperantisto Joseph R. Scherer en sia “loĝ-aŭtomobilo”, per kiu li veturis tra la tuta mondo (1934).

## Ricevitaj libroj

Gubbins, Paul. *Kunvojaĝu*: Praktika Esperanto-kurso por studentoj kaj plenkreskuloj. — 2a eld., reviziita. — Pisa: Edistudio, 2006. — 240 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

Karpunina, Lena. *La bato*: [Originala novelaro] / Antaŭpar. Ignat Florian Bociort. — 2a eld., reviziita kaj pliampleksigita. — Moskvo: Impeto, 2006. — 160 pĝ. — [Aĉeto].

Migliorini, Bruno. *Lingvaj aspektoj de Esperanto* / Enkond. Carlo Minnaja, Tullio De Mauro. — 2a eld., reviziita. — Pisa: Edistudio, 2006. — 112 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Scholland, Ken. *La aventuroj de Jonatano Gullible*: Libermerkata Odiseado / Antaŭpar. Steve Cobb, Fred Foldvary; Tradukis el la angla Ĵenja Amis. — Moskvo: Impeto, 2006. — 144 pĝ., il. — [Aĉeto].

## Ricevitaj gazetoj

Esperanta Finnlando. 2007/3a; Esperanto aktuell. 2007/2; Esperanto sub la Suda Kruco. 2007/3; Esperanto. 2007/5; Heroldo de Esperanto. 2007/3,4,5; Internaciisto. 2007/87; Juna Amiko. 2007/1; Komencanto. 2007/1,2; La Movado. 2007/673,674; La Ondo de Esperanto. 2007/5; La Revuo Orienta. 2007/4; Le Monde de l'Espéranto. 2007/561; Literatura Foiro. 2007/226; Litova Stelo. 2007/2; Mikrofone. 2007/17; Monato. 2007/5; Norvega Esperantisto. 2007/2; Okazas. 2007/561; Svisa Esperanto-Societo Informas. 2007/1; Verda Saksfono. 2007/17.

## KOD: ĉu ideala interlingvo?

En Germanujo ekde sep jaroj la esplorinstituto “eufo” (<http://www.eufo-institut.de/>) de tempo al tempo aperas en la gazetaro per nova interlingvo KOD, kiu laŭdire estas perfekta: same lingve alirebla por ĉiu homo, pli facila ol Esperanto, trovonta grandan akceptemon en la publiko.

Financas la projekton, por kiu laboras ĉirkaŭ dek lingvistoj, konata entreprenisto en Regensburg, kiu celas realigi unu el siaj dumvivaj revoj per KOD.

Analizante la sistemon laŭ la unua broŝuro, kiu aperis en 2006, oni konstata tamen, ke grandparte la asertoj kompreneble estas malĝustaj: la lingvista kunlaborantaro intertempe konstatis la neceson de “kompromisoj”, kiuj tiom limigas la “perfektecon”, ke oni ne plu vidas avantaĝojn de KOD kompare kun, ekzemple, Esperanto. Tute inverse.

La kerna ideo de KOD estas, ke ĉiu produktanto de teksto en KOD uzas morfologion “kiel en sia gepatra lingvo”, per afiksoj, kiuj havas gramatikajn signifojn. Notu bone: ĉiu do uzas alian morfologion ol malsamlingvano; la problemo estas do kompreni tekston, en kiu svarmas (laŭforme arbitraj!) afiksoj por normalkaze tute fremdaj gramatikaj kategorioj. Kaj en KOD oni konas pli ol 300 gramatikajn afiksojn (dum Esperanto havas pli-malpli 15)!

Plia profunda eraro de la koncepto estas, ke ankaŭ la ordinara lingvoproduktanto tute ne “sentas sin lingve hejme, esprimante sin en KOD” (el tio rezultu la pli granda akceptemo kaj la asertita tutmonda lingva alirebleco), ĉar kiu konas bone la morfologian sistemon de sia gepatra lingvo? Oni parolas kutime, sen konscii pri ĝi.

Ekzistas pliaj profundaj obstakloj, pri kiuj mi silentas tie ĉi. Al mia kritiko la KOD-grupo respondis nun surprize, ke KOD ne estas interlingvo, nur enkodiga sistemo de skribitaj tekstoj en ĉiuj (?) lingvoj de la mondo.

Tio kontraŭdiras la celitan formon de KOD: la formon de la arbitraj radiokaj afiksoj destinis bona elparolebleco, kelkaj aliaj radiokaj cetere havu Anglan prononcon!

La projekto entute estas giganta foruzo de mono, neglektante la interlingvikan literaturon, sed, kiel gazeto menciis ironie, la utilo de ĝi estas, nutri dek lingvistojn.

**Rudolf Fischer**

Por la marta tasko *Trovu numeralojn* venis 13 respondoj. La solvintoj ne nur trovis ĉiujn solvojn, proponitajn de la kompilitino, sed aldonis pliajn (enkrampe). La ĝustaj respondoj estas: *akvario, patrino (panduo), sekvinbero, sesio (sepio, itrio), milio, septembro, okro (roko, duro), punu, kamomilo, apenaŭ, deklivo, docento (doko), paduso, kunulo (koklo), almenaŭ, tribuno, pendumilo, kosmonaŭto.*

La ĝustajn respondojn sendis: Brian Bishop, Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Bruno Lehtinen, Erkki Kempainen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Ester Olsen (Norvegio), Dorota Burchardt, Waclaw Rekowski, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Bronislav Ĉupin, Klara Ilutoviĉ, Svetlana Konjaŝova. (Ruslando). La premio estas sendita al **Malcolm Jones**. Ni gratulas!

## Trovanto

Trovu en la suba teksto 2 plensencajn frazojn, kaŝitajn inter vortoj. Ekzemple: la sciuro estas **besto** gracia kaj lerta., ktp.

Geknaboj kuris al la maro. Sonora voĉo de Irina ĝis la lasta momento sonis en pura aero. Poste ili ĵetis sin en blujajn ondojn kaj longe, delice povis ĝui ilan karesan tuŝon. Kiam la bordo jam estis for, tempesto abrupte falis al la antaŭe tiel kvieta maro. Ondegoj ekkirlis. Feliĉe, iu fiŝista boato videblis apude. La fiŝistoj ĵetis al la infanoj ŝnuregon kun granda marista nodo, raspa kaj facile kaptebla. La infanoj enrampis en la boaton kaj dankis siajn savintojn.

La trovitajn frazojn sendu al la redakcio tiel, ke ili atingu nin antaŭ la 15a de julio.

Kompilis **Tatjana Auderskaja**

## Helpu Zamenhof-statuon

La Zamenhof-statuo sur la kultura placo de Zaozhuang en Ĉinio (vd. LODE-132, pĝ. 9) estas la plej granda en Azio. Ĝi fariĝas bona loko por esperantistoj kaj turistoj. Sed pro la malalta piedestalo oni fotiĝas ne bele ĉe la statuo. Krome petolaj infanoj ofte malbeligas la statuon.

Ni do decidis altigi la piedestalon, beligi ĝin per nigra ŝtono, kaj konstrui vojajn vizitojn la statuon. Tiucele estas starigita speciala fonduso. La nomoj kaj landoj de la donacintoj estos skribitaj sur la piedestalo.

*Banko:* Zaozhuang-a branĉo de Ĉina Banko.

*Nomo:* Zaozhuang-a Esperanto-Asocio.

*Kodo:* 405253105908091001.

Kontaktu rete: [verdalumo@126.com](mailto:verdalumo@126.com), [semio@163.com](mailto:semio@163.com)

**ZEA**



## SPRITAJ SPLITOJ KAJ PRESKERAROJ el la kolekto de reduktoro

### La Ondo ne porkula, aŭ: Ĉu Janowczyk nun sub kulinvado?

La Ondon la unuan fojon mi vidis en Moskvo ĉe Miŝa Abramoviĉ... Dum la vespero Miŝa ne permesis uzi ĝin por mortigi kulojn. Tiaj estis la komencoj, poste dum jaroj mi al kutimiĝis. (Paweł Janowczyk, *La Ondo de Esperanto*, 2007, №4, pĝ. 2)

### La listo "ehist"o: ĉu ehistorio aŭ ehisterio?

Ziko, vi estas stulta azeno. Se vi volas ke Kissinger bugru vin, nur petu: eble li kompleksos, se li ne devos vojaĝi al lando kie oni povas aresti lin pri amasmurdo. (Ralph Dumain; 1 maj 2007, <http://groups.yahoo.com/group/ehist/message/1262>)

### Okazo absolute kaptinda

... la pritrakto de la ĝisnuna apliko de la direktivo Hiltbrand (Mutuala Rabata Sistemo) donis la okazon difini diferencon inter la paktintaj establoj. (HeKo 329 2-C, 29 apr 2007, <http://www.esperantio.net/index.php?id=327>)

### Dum dormo diktatura

Dritero Agolli estas... eksa prezidanto de la Ligo de Verkistoj kaj Artistoj de Albanio dum la totalisma reĝimo. (Bulteno de la Albana Esperanto-Instituto, 2006, №68)

### La estoneco estos nia

NASA por la estoneco vokas al la homaro fosi la kalkulojn en la lunon kiom frue tiom 2015 kaj ne pli poste ol 2020. (Revuo de Ŝakalknabino, [http://jackalgirl.blogspot.com/2006\\_06\\_04\\_jackalgirl\\_archive.html](http://jackalgirl.blogspot.com/2006_06_04_jackalgirl_archive.html))

### Zamenhof plagiatas

Herodoto: Historio. Tradukita en Esperanto de Spiros Sarafian. <...> Verkoj de la aŭtoro: 1. "La internacia lingvo Esperanto". (Enkonduka paĝo el la koncerna libro, eld. Silloges. Ateno 2006; rimarkis Ionel Onet)

### Simbola distancigo, aŭ: For kun Eŭropo!

Uzi simbolojn por pliforigi la Eŭropa konscion kaj identecon... (Aleks Kadar, 28 mar 2007, <http://fr.groups.yahoo.com/group/europpo/message/2684>)

Plukis **István Ertl**

## Ridu kun ĥoloj

- Ha lo! Ĉu policejo?
- Ne, privata loĝejo, sed mi povas voki mian edzinon!
- Naskiĝis al mi ĝemeloj!
- Kaj al kiu ili similas?
- Kompreneble unu la alian.

La vira vivo aspektas jene: unu virinon vi amas, vi loĝas kun la dua, vi dormas kun la tria, infanon vi havas kun la kvara kaj amas vin la kvina. Kaj la kvina estas via patrino!

- Kial vi, sinjoro, postiradas min?
- Nun, kiam vi turniĝis al mi fronte, mi ne scias — kial.
- Viaj ĥoloj komencas griziĝi. Ĉu vi uzas iujn rimedojn por haltigi tion?
- Jes, mi nun divorcas.

Tradukis esperantistoj el Olsztyn (Pollando)



## Unufraze

★ En la tutlanda censo de Nov-Zelando 120 personoj indikis Eon responde al la demando: “Per kiu(j) lingvo(j) vi kapablas paroli pri ĉiutagaĵoj?” (*Esperanto sub la Suda Kruco*)

★ 10 maj 2007 franca nacia agentejo por Eŭropa Junulara Programo akceptis la projekton “Ekkoni Esperanton en lernejo”, iniciatitan de la E-Kulturcentro de Tuluzo; nun en EU-landoj estas serĉataj taŭgaj kandidatoj 18-26-jaraj por la posteno. (TEJO-Aktuale)

★ Prof. Giorgio Silfer, kiel delegito de Kultura Centro E-ista, partoprenis en kolokvo de Konsilio de Eŭropo (Sèvres k Parizo, 17-20 apr 2007) pri la sekvoj de la Komuna Eŭropa Framo de Referenco. (HeKo)

★ 11 maj 2007 Vilmos Benczik (Hungario) habilitiĝis en Pécs surbaze de sia verko *Signo, sono, skribo*; li raportis en la lingvoj hungara, hispana k Eo. (Per-esperanto-literaturo)

★ Aktivuloj de laborista A-asocio ASELT partoprenis la unuamajan manifestacion de la laboristoj togolandaj k disdonis centojn da E-informiloj. (KomACE)

★ Firmao *Sandler Energietechnik* (Germanio) ekde majo laboras kun la nova nomo *Varmeco*; en ĝia retejo ([www.varmeco.de](http://www.varmeco.de)) estas klarigo pri la signifo de “Varmeco” en Eo. (Esper-german)

★ 23 mar reprezentantoj de la roma E-klubo *Luigi kaj Carolina Minnaja* vizitis s-inon Zoraide Carrubba por kune festi ŝian 103-jariĝon; probable ŝi estas la plej aĝa e-istino en la mondo. (*Esperanto*)

★ Post informa kunveno, kiun partoprenis ĉ. 100 personoj, Aleksandr Blinov aranĝis meze de aprilo E-kurson ĉe la fremdlingva fakultato en la Ĉuvaŝia ŝtata universitato. (Esperanto-rus-informoj)

★ En la universitato de Restadejo Sankta Maria en Burgos (Hispanio) d-rino Rafaela Urueña pri “Esperanto, de la komenco ĝis la 21a jarcento” (8 maj) k Pedro Garrote pri “Esperanto, facila lingvo” (15 maj) prelegis antaŭ granda ĉeestantaro. (Luis Hernández)

## Kaj rapide kreskas la afero ...

10 maj en Moskvo ĉe esperantista paro Liana Tuĥvatulina kaj Gennadij Ŝilo aperis filino Sofia.

28 apr en Darmstadt en la internacia familio Andreas kaj Lena Emmerich naskiĝis la dua infano — filo Ludwig Otto.

*Ni gratulas kaj bondeziras!*

## Internacia Esperanto-Konferenco en Pazarĝik, Bulgario, 14a-20a de julio

### Mitoj kaj legendoj

postkonferencaj ekskursoj al Plovdiv, Baĉkovo, Kazanlak, Karlovo

**Kontaktaj:** Georgi Mihalkov, 1229 Sofio, ĵ. k. “Nadejda” V, bl. 529, vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario

☎ (02)934-42-55 ✉ [modest@abv.bg](mailto:modest@abv.bg)

Eric Laubacher, 1 rue Bougainville, FR-78180 Montigny-Bx.

☎ +33 1 30 96 67 91 ✉ [kasisto@osiek.org](mailto:kasisto@osiek.org)

## FOTORAPORTOJ



1 maj 2007, Parizo. Esperantistoj, ekipitaj per flago, banderolo, kaj naŭ literpaneloj, partoprenis en la tradicia laborista manifestacio. (Teksto Vinko Markov / Foto Patrice Leclerc)



15 apr 2007 lingva festivalo en Volgograd (Ruslando) allogis pli ol 400 personojn. Inter 32 prezentoj plej bone vizititaj estis la japana, korea, ukraina, hinda kaj Esperanta. (Valentina Spicina)




Inter reprezentantoj de diversaj ŝtatoj kaj instancoj en la ceremonio dum la memortago de la Holokaŭsto 16 apr en Jerusalemo estis du esperantistoj. Tom Juval (prezidanto de Junulara Esperanto-Ligo Israela) kaj Malka Zemeli (komitatano de Esperanto-Ligo en Israelo) metis florbukedon. (Teksto Sergej Tyrin / Foto Aleks Kolomojski)






Fjodor Dostojevskij.  
*Blankaj noktoj*: Ses prozaĵoj.  
448 paĝoj, € 30,0.



Anton Ĉeĥov.  
*Ĉeriza ĝardeno*: Noveloj, dramoj.  
352 paĝoj, € 27,0.



Rusa Novelaro. Volumo 1  
*La 19a Jarcento*.  
400 paĝoj, € 30,0.




*Samideanoj*: Satori kaj humuraĵoj  
pri Esperanto kaj pri esperantistoj.  
80 paĝoj, € 7,5.



Georges Simenon.  
*Amiko el la junaĝo de Maigret*.  
128 paĝoj, € 12,0.




Trevor Steele.  
*Diverskoloro*: Originalaj prozaĵoj.  
112 paĝoj, € 10,0.



Aleksander Korĵenkov.  
*Historio de Esperanto*.  
128 paĝoj, € 12,0.



L.L. Zamenhof  
*Mi estas homo*.  
288 paĝoj, € 24,0.



Aleksandr Duliĉenko.  
*En la serĉado de la mondlingvo*.  
160 paĝoj, € 15,0.